

1977 decembro

70-a jaro


n-ro 864 (12)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — nl-3015 bj rotterdam — nederlando



Irano:
Ĉu la orienta pordego
malfermiĝas por ni?

Vi trovos

dika ĉi tiun numeron de la revuo, pro la ampleksa aldonajo, kies graveco multoble superas ĝian amplekson. Dika estas ĉi tiu numero ankaŭ pro la graveco de la longa intervjuo el Irano. Fakte, tio ĉi eble estas nia unua numero —dum multaj jaroj— en kiu ĉefrolas temo ne-eŭropa. Des pli grave, ke temas pri la ekstereŭropa Esperanto-movado. Tio ĉi do estas eble nia unua azia numero, sed ĝi certe estas nia unua irana numero. Por simbolo esprimi ĝi, ni diru, ke necesas eniri la moskean korton de nia kovrila bildo kaj preĝi, ke ekstereŭropaj numeroj de ĉi tiu revuo fariĝu kiel eble pli oftaj en la estonteco. Ni ja memoros, ke ne sufiĉas nur preĝi. Necesas ankaŭ labori en tiu direkto. Necesas helpi tiujn, kiuj jam laboras sur tiu kampo.

Vi bonvolu atenti la indikon sur la paĝo 202, supre, dekstre, kiu avertas, ke vi en nia januara numero trovos la duan parton de la irana intervjuo. Tiun duan parton almenaŭ la redaktoro trovis eĉ pli interesa, ol estas la parto trovebla en ĉi tiu numero. Vi ja mem povos tion juĝi post kelkaj semajnoj! Ĉu vi, cetere, ankoraŭ memoras tiun forgesitan tempon, kiam ni de numero al numero serĉis manierojn por ĉi-loke en la revuo klarigadi al vi la malfruadon de la revuapero? Ni nun ne malfruas, sed ni ja povus demandi vin, ĉu vi hazarde malfruas kun la pago de via venontjara kotizo? Pardonu pro la impertinenteta demando kaj akceptu nian lastan saluton en 1977!

Enhavo

- 201 Nova eldonajo de Unesko en Esperanto: Kvazaŭ nia propra laborplano (sm)
- 202 Intervjuo kun d-ro M.H. Saheb-Zamani: Kial Esperanto furoras en Irano? (V. Sadler)
- 206 Informoj de CED: Raporto pri LPLP (Jonathan Pool)
- 209 Foto-servo pri Zamenhof: Granda galerio de Henk Thien (sm)
- 210 Faka agado: Vastaj horizontoj (jkh), Kastoroj kaj onkloj (J.H. Sullivan)
- 211 Recenzoj ("Bábel tól a Világnyelvig", "Renesanca periodo, La", "Kantoj poemoj kaj satiroj")
- 213 Laste aperis ... (novaj eldonajoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 214 Kalendaro: Bonan vojaĝon!
- 215 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 216 Ekzameno E (Bernard Golden)
- 217 Esperanto en radio, Oficiala informilo el la CO de UEA
- 218 Indekso de la jarkolekto 1977 de ĉi tiu revuo
- 220 Anoncetoj

La kovrilo

"Pilgrimantoj kolektiĝas por vespera preĝo en la korto de la moskeo Gowhar Shâd", estas la titolo de nia kovrila bildo, prunteprenita el la majesta fotolibro "Persia — Bridge of Turquoise" (Persio — Ponto el turkiso) de Roloff Beny. En la antikva korta pompo, grandioza en la maniero, kiel tio sole en la Oriento eblas, okazas io alia krom la kolektiĝo. Io nova konstruiĝas tie, en la fono, maldekstre. Ni elektis ĉi tiun foton por simboli la kreigon de la impone amasa Esperanto-movado en tiu praa Persio, en la nuntempa Irano, al kio ni dediĉas la plej grandan spacon en ĉi tiu numero de la revuo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Mińsk, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.

Kvazaŭ nia propra laborplano

KIEL aparta aldonaĵo de ĉi tiu numero de la revuo venas al vi la 8-paĝa broŝuro *Rekomendo pri edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco kaj edukado rilate al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj*. Post siatempa eldono de la afiŝserio pri la homaj rajtoj kaj la broŝuro *Oriento kaj Okcidento – al reciproka kompreno* (1962), tio ĉi estas la tria eldonaĵo de Unesko en la Internacia Lingvo. Kiel ni anoncis en la oktobra numero (p. 161), baldaŭ sekvos la Esperanta eldono de la baza informilo pri la monda organizaĵo por edukado, scienco kaj kulturo. Ankaŭ tiu intensigo de la eldona aktiveco de Unesko en la Internacia Lingvo spegulas ĉiam pli fruktodonan kunlaboron inter Unesko kaj UEA.

La *Rekomendo* – ni uzu ĝian tiel mallongigitan titolon – verŝajne ne montriĝos malkovro por la Esperanto-movado. Ĝi ja diras al ni preskaŭ precize tion, kio jam dum jardekoj, eble eĉ dekomence, estas enkonstruita en la fundamenton de la Movado. Ĉar, kio alia estus la baza celo de la Esperanto-movado, se ne la resto de la broŝura titolo – ”edukado por internaciaj kompreniĝo,

landajn etnajn kulturojn kaj kulturojn de aliaj nacioj”, aŭ notante inter la bazaj principoj ankaŭ la strebon al ”kapablo komuniki kun aliaj homoj”. Multaj aliaj partoj de la *Rekomendo*, ne nur la cititaj, sonas kiel larĝa ekspliko de tio, kion oni trovas en la Statuto de UEA, sub la paragrafo ”Celoj”. La *Rekomendo* montras fortan similecon al la laborplanoj de UEA aŭ de la Esperanto-movado ĝenerale. Fakte, la *Rekomendo* estas kvazaŭ nia propra – movada – laborplano.

Tial ni diris, ke la Movado ne trovos la enhavon de la broŝuro esti malkovro, io nova, ĝis nun ne konata. Efektive, la *Rekomendo* estis aplikata kaj praktikata de la Esperanto-movado eĉ antaŭ ol tiu dokumento ekzistis, antaŭ ol ĝi akceptiĝis en la 18a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo, la 19an de novembro 1974. Tamen, la fakto, ke nun en la formo de la *Rekomendo*, kiun en Unesko akceptis reprezentantoj de ĉiuj suverenaj ŝtatoj de la mondo, venas ideoj saturitaj de tiu al ni bone konata bjalistoka spirito, tio devas egali al malkovro, al kuraĝiga rekonfirmo de la bazaj principoj kaj idealoj de la Esperanto-movado.



kunlaboro kaj paco kaj edukado rilate al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj”? En la ĉapitro 3, ”Gvidaj principoj”, oni legas jenan citaĵon el la *Universala deklaracio de homaj rajtoj*: ”Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu la komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasaj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝintaj Nacioj por konservo de la paco.” La *Rekomendo* en la sama paragrafo plie proksimigas al la Esperanto-movado tiun starpunkton, parolante pri ”kompreno kaj respekto por ĉiuj popoloj, iliaj kulturoj, civilizoj, valoroj kaj vivmanieroj, inkluzive en-

La *Rekomendo* havas almenaŭ unu mankon: Ĝi ne diras al ni per kiu komunika rimedo ni praktiku la internaciajn kompreniĝon kaj kunlaboron, eĉ se ni sukcesos edukiĝi en tia spirito pere de niaj gepatraj lingvoj. Cetere, al ni en la Esperanto-movado ne necesas diri tion. Ni scias kaj profunde konscias pri la sola komunika rimedo – la Internacia Lingvo –, kiu povus garantii la plej efikan praktikadon de la noblaj ideoj el la *Rekomendo*. Venos ankaŭ tempo, kiam Unesko aŭ alia internacia forumo forigos la menciitan mankon. La fakto, ke Unesko nun eldonas ĉi tiun broŝuron en la Internacia Lingvo kondukas nin paŝon pli proksime al tiu tempo.

Kial Esperanto furoras en Irano?

Dum la lastaj du jaroj venis al ni informoj pri la Esperanta agado en Irano, kiuj plej ofte sukcesis konfu-zi nin, ĉar ili sonis — kiel tion konfesas d-ro Saheb-Zamani mem — kvazaŭ ĉapitroj el "Mil kaj unu noktoj". Ni timeme traktis parton de tiuj novaĵoj ekz. en nia pasintjara decembra n-ro. Nun la direktoro de la CO de UEA, d-ro V. Sadler, iris fine de oktobro kaj komence de novembro libertempi en Irano. Laŭ nia peto, li tie faris longegan intervjuon kun la ĉefmotoro de la irana Esperanto-agado. Trovante la intervjuon interese, ni decidiĝis publikigi la tuton. La dua parto sekvos en nia numero de januaro 1978.



Demando: D-ro Saheb-Zamani, jam pasintjare vi komencis instruadon de Esperanto en la Universitato de Teherano kaj jam tiam havis ĉirkaŭ 2 500 lernantojn. Nun komenciĝis nova universitata jaro, kaj oni inaŭguris novajn kursojn. Ĉu la interesiĝo estas same granda, kiel pasintjare?

Respondo: Jes, eĉ pli. La interesiĝo ĉiam pli kreskas, ĉar ni tiel sukcesis ĉe la amasmedioj, ke preskaŭ ĉiu-semajne io aperis pri Esperanto en ĵurnaloj, gazetoj aŭ radio. Do la publiko povis daŭre informiĝi, ke ne temas pri io efemera sed pri io konstante aktuala. Multaj el niaj lernantoj forte interesiĝis, tiel ke ankaŭ ili komencis diskonigi la aferon. Ni nun kreis entute eble 12 instruantojn, kiuj pretas senpage instrui Esperanton en diversaj lokoj po ĉ. 4 horoj semajne. Ankaŭ ili estas nukleo, el kiu nun disradias la ideo pri Esperanto. La libroj, same, ludas rolon. La lernolibro *La dua lingvo* atingis jam la trian eldonon en malpli ol 10 monatoj. La unua eldono estis en 5 000 ekz., tiam post 2 monatoj ni devis represi ĝin en 2 000 ekz., kaj nun, nur antaŭ kelkaj tagoj, aperis la tria eldono en 7 000 ekz., do entute 14 000 ekz. La Universitato de Teherano komencis reprodukti ĉiujn gazetartikolojn pri Esperanto en la formo de numeritaj bultenoj, sub la titolo "Esperanto kaj la gazetaro", kaj ĝis nun ni povis distribui 22 tiajn bultenojn. Tiel ni atingis multajn pliajn homojn. Ĉi-jare mi vidas en niaj kursoj aliajn specojn de lernantoj, ol pasintjare: pli prestiĝajn personojn, ekzemple, pensiitajn kolonelojn, unu el la direktoroj de la Ministerio de Edukado, la vic-ĝeneralan direktoron de la Ministerio de Energio, kiu mem estas profesoro de la Teknika Universitato. (Estas interese, ke kiel vi mem povis vidi, li mem daŭre promenas kun aŭdilo en unu orelo. Li diras: "La homoj kredas, ke mi surdiĝis. Sed ne gravas, kion ili pensas. Fakte, mi havas vian kurson en kasetofono en la poŝo, kaj mi daŭre reaŭskultas ĝin.")

D: Laŭ la vendiĝo de via lernolibro oni povas supozi, ke krom la lernantoj en viaj kursoj ankaŭ multaj aliaj homoj en Irano nun klopodas lerni la lingvon meminstrue. Vi vendis jam 7 000 ekzemplerojn, vi havis 2 500 kursanojn, do ie ekzistas ankoraŭ 4 500 homoj, kiuj ne havas instruiston.

R: Sendube estas tiel. Ni ricevadas leterojn el multaj partoj de la lando. Feliĉe, la Universitato de Teherano ŝarĝis oficiale du personojn en la Fakoj de Kulturaj Aferoj respondadi al informpetoj pri Esperanto, kaj ili ĉiutage ricevas leterojn el multaj partoj de la lando. Kompreneble ili kutime konsultas min pri la plej bona maniero respondi. Do el tio ni jam scias, ke en multaj urboj ekestis interesiĝo, kaj krome, la eldonisto de la lernolibro informas nin, kiom da ekzempleroj estas mendataj en kiuj lokoj. Mendoj nun alvenadas ĉiutage.

D: Por esperantistoj en aliaj landoj la interesiĝo ĉi tie ŝajnas tre subita fenomeno. Ĉu tiu interesiĝo estas grandparte spontana aŭ, ĉu ĝi ekzistas nur dank' al zorga preparlaboro de la publika informiteco?



R: Mi devas, por klarigi tion, unue rakonti pri mi mem. Mi ekinteresiĝis pri Esperanto jam antaŭ 30 jaroj. Nun mi estas 46-jara. Tiutempe mi trovis libreton eldonitan de la forpasinta Bahman Ŝidani, kiu pioniris Esperanton en Irano antaŭ ĉ. 55 jaroj. Mi legis ĝin kaj trastudis ĝin kun pluraj miaj lernejoj kamaradoj. Tiutempe ne niu sciis ion pri Esperanto, sed kelkaj diris, ke ĝi estas ligita kun unu religia sekto. Do en tiu tempo mi ne povis vere ion fari, sed mi verkis kaj eldonigis broŝureton, en kiu mi dediĉis 3 paĝojn al priskribo de Esperanto. Poste mi iris al Eŭropo por studi, kaj mi ne plu multe pensis pri Esperanto, ĉar mi estis tre okupita. Sed antaŭ proksimume 2 jaroj kaj duono, trarigardante mian bibliotekon, mi rimarkis tie miajn notojn pri

Esperanto, laŭ kiuj mi promesis iam eldoni ion por tiu lingvo. Kvankam neniu iam demandis min pri tio kaj verŝajne ĉiuj jam forgesis pri la ekzisto de tiu mia broŝureto, mi tamen sentis ian honton kaj kulpon, ke mi faris iam promeson publikan sed ne plenumis ĝin. Do mi skribis al Britujo, al Francujo, al Nederlando, kaj mi petis konatojn miajn, kiuj vojaĝis, esplori, kiel nun statas la afero de Esperanto en la mondo, kiom da eldonaĵoj ekzistas, kiom da societoj funkcias ktp. Kiam mi disponis pri sufiĉe da informoj, tiam mi komencis fari planon por la agado. Unue mi ekinstruis Esperanton hejme al pluraj el miaj parencoj, al malgrandaj infanoj, unu el ili 9-jara, kaj poste mi foje anoncis al miaj gestudentoj en la Universitato: "Venontan semajnon mi volus rakonti al vi pri io tre nova, tre interesa, pri kio vi certe neniam aŭdis antaŭe." Do ili fariĝis tre scivolaj, kaj venis amase al la posta leciono. Unue mi prelegis pri la lingvo-problemo, ankoraŭ neniel menciante Esperanton. Nur post unu horo da kritikoj pri la naciaj lingvoj kaj pri la nuntempa lingvo-instruado mi klarigis, ke laŭ mia opinio ekzistas solvo, ke tiu solvo estas Esperanto, kaj mi donis enkondukan lecionon pri ĝi. Ili estis tre entuziasmaj kaj petis min instrui la lingvon al ili. Unu el miaj studentoj, islama pastro, proponis al mi la uzon de unu lia privata ĉambro, kie lia edzino kutimis dufoje semajne instrui pri *Korano* al sinjorinoj. Tie estis kelkaj seĝoj kaj nigra tabulo, do tie mi komencis instrui al eble 15 personoj, inter kiuj estis ankaŭ tiu pastro. Tio estis la unua paŝo. Tiam ni alparolis lernejestron de privata lernejo, petan-

kaj psikologiaj temoj kaj la rezulto de miaj paroladoj aperis en 4 volumoj, el kiuj unu jam atingis la 15an eldonon. Pro tio mi jam fariĝis sufiĉe konata en la amasmedioj, kaj do estis facile por mi telefoni al tiu aŭ alia ĵurnalisto aŭ redaktoro, dirante, ke mi havas ion, pri kio mi volus scii lian opinion, kaj invitante lin al lunĉo por preparoli ĝin. Kutime ili akceptis, kaj ni do sidigis kaj pridiskutis Esperanton. Mi ĉiam kunportis tekon plenan de libroj, precipe la Esperanta traduko de *Korano*. Do ofte, post du horoj da parolado, kiam mi ankoraŭ ne klarigis, kion mi volas peti de ili, ili mem komencis diri: "Nu, kion ni povas fari por vi?" Ili konsentis, ke temas pri grava afero. Do mi diris: "En via gazeto vi publikigas ĉiaspecajn informojn, do kial ne ankaŭ kulturajn informojn pri Esperanto?" Ili respondis, ke ili ne disponas pri tiaj informoj. Tamen, kiam mi certigis, ke mi povos liveri al ili informojn, ili konsentis publikigi. Mi komencis ekstrakti kaj kompili mallongajn novaĵojn el tio, kion mi legis en la Esperanta gazetaro, precipe en *Esperanto* kaj *Heroldo de Esperanto*. Mi faris nur mallongajn informojn, sed mi ĉiam adaptis ilin al la irana pensmaniero kaj verkis ilin laŭ la gusto de la koncerna publiko. Do unu post alia, inter la aliaj mondaj novaĵoj, ekaperis tiaj informoj pri Esperanto. Poste, mi parolis kun Etalaat, kiu estas unu el la plej elstaraj kaj riĉaj gazeteldonejoj. Ĝi havas perslingvan vesperan gazeton, matenajn gazetojn anglan kaj francan, *Tehran Journal* kaj *Journal de Téhéran*, ankaŭ internacian arablingvan ĵurnalon, tre popularan junularan gazeton, gazeton por virinoj, por sportistoj kaj diversaj aliaj.

La dua plej influa eldonejo estas Keihan, kiu eldonas matenan anglalingvan gazeton *Kaihan International*, perslingvan virinan gazeton *Zane ruz* (Hodiaŭa virino), kaj ankaŭ gazetojn por infanoj kaj sportistoj, krom kompreneble perslingvaj ĵurnaloj. Poste mi ekrilatis kun aliaj matenaj ĵurnaloj, unue *Rastarhiz* (Releviĝo), la oficiala organo de la sola politika partio de Irano, kaj poste kun *Ajandegan*, kies redaktoro nun fariĝis la ministro de informado kaj sekve transdonis la redaktorecon al iu alia. Ni skribis ankaŭ en *Negin*, unu el la plej influaj monataj revuoj, kaj same en *Daneŝ Kade*, la ĝenerala revuo de la Universitato de Teherano. Rezulte de tiu artikolo iuj el la universitataj aŭtoritatuloj petis min fari prelegon pri tio, kion mi baptis la "lingva revolucio". Tiu prelego poste aperis en broŝura formo sub la titolo *La kulturo kaj la revolucio lingva* — siatempe jam menciita en la revuo *Esperanto*. Multaj aŭskultantoj-studentoj tie demandis: "Kie ni povas lerni ĉi tiun lingvon?" Mi kaptis la okazon kaj respondis: "Se la estimataj sinjoroj de la Universitato — la profesoroj, la direktoro, la rektoro, kiuj ĉiuj ĉeestas ĉi tie — donos al mi klasĉambron, mi volonte instruos al vi senpage." La direktoro pri kulturaj aferoj de la Universitato, profesoro B. Saruĥani, ankaŭ li sociologo, respondis: "Se ĉi tiu salono, en kiu vi prelegas, taŭgas por vi, ĝi estas je via dispono, vi povos komenci." (Ĝi estis taŭga salono, por 110-120 personoj.) Ni do povis transloki nian kurson el la lernejo al la Universitato.



D-ro M.H. Saheb-Zamani, elstara irana intelektulo, kiu organizas ĝis nun ne viditan informan kampanjon pri Esperanto. Ĉu el Irano venas al la resto de la Movado leciono pri moderna strategio de agado?



te lin disponigi senpage klasĉambron. Mi devis skribi al la Ministerio de Edukado por peti permeson tie instrui Esperanton, kvankam tute senpage. Oni respondis, ke mi ekuzu tiun salanon, sed ke la formalaj postulos iom da tempo, antaŭ ol mi ricevos oficialan respondon al mia letero. Mi kredas, ke ili volis vidi, pri kio temas, ĉar pluraj personoj, eĉ la ĝenerala direktoro de edukado por Teherano, venis al mia klaso por observi. Fine, post pluraj monatoj mi ricevis oficialan respondon, ke, kondiĉe ke temas pri senpaga instruado, mi rajtas daŭrigi.

Tiam mi komencis kampanjon de alparoloj al unuopaj ĵurnalistoj kaj redaktoroj. Mi devas unue klarigi, ke dum ĉ. 6 jaroj mi faradis radio-paroladojn pri sociaj

Intertempe ni daŭrigis la distribuadon de novaĵoj pri Esperanto al la gazetaro. Estas grave menciitaj, ke neniam mi subskribis la informojn. Do la legantoj povis nur pensi, ke jen gravaj kulturaj novaĵoj, kiujn la gazetoj aperigis tute normale. Entute en la lastaj 2 jaroj kaj duono aperis 75-80 informoj, el kiuj tamen multaj estis ripetoj de informoj aperintaj en aliaj gazetoj. Da diversaj informoj aperis eble 35-40.

Tiam komenciĝis la eldonado de la jam menciitaj bultenoj "Esperanto kaj la gazetaro" fare de la Universitato. Da tiaj kserografiitaj informoj estis disdonitaj miloj, eble eĉ dekmiloj da ekzempleroj. Ĉiu ajn, kiu petis informojn, ricevis serion da tiaj bultenoj, kaj multaj eĉ komencis skribi, ekzemple: "Mankas al mi n-ro 7, bonvolu sendi ĝin." Ni scias, ke oni ankaŭ prenis tiajn bultenojn kaj sendis ilin al eksterlando. Vi devas scii, ke Irano havas ekzemple 50 000 studentojn en Usono. Iliaj gepatroj en Irano eksciis de aliaj studentoj, ke ekaperis io grava, do ili prenis la bultenojn, sendis ilin al siaj filoj en Usono aŭ aliloke kaj skribis: "Iru vidi mem, kio estas tie tiu Esperanto. Ĉi tie ĉiuj parolas pri ĝi, do eble vi devus lerni ĝin." Eĉ al Aŭstralio oni sendis. Rezulte komencas alveni ankaŭ leteroj de studentoj en aliaj landoj. Teherano fariĝis iasence do Mekko de Esperanto por ili. Mi havis amikon eldoniston, kiu deklaris sin preta eldoni ĉion pri Esperanto. Li jam eldonis la lernolibron *La dua lingvo* kaj la malgrandan vortareton Esperanto-persan. Nun li preparas la eldonon de miaj kolektitaj artikoloj pri Esperanto, kiuj ampleksas pli ol 550 paĝojn kaj estas jam en presprovaĵa stadio. Ankaŭ aliaj eldonejoj ekinteresiĝis. Unu el ili nun jam represas la persan lernolibron de antaŭ 50 jaroj, bazitan sur la franca de Grosjean-Maupin.

Resume mi povas diri, ke ni koncentris niajn klopodojn je diversaj influaj homoj en la medioj de amas-komunikado en Irano. Precipe ni zorgis ankaŭ kontakti kun religiaj gvidantoj kaj klarigi al ili, ke Esperanto ne estas ligita al iu ajn religio aŭ politika linio. Mi kontaktis ankaŭ kun multaj registaraj instancoj, ekzemple la ministro de scienco, kun multaj profesoroj kaj instruistoj, mi prelegis diversloke en universitatoj, en la Instituto de Internaciaj Rilatoj de la ministerio de eksterlandaj aferoj. Tie mi argumentis, ke niaj diplomatoj, eĉ se ili nuntempe ne havas tempon por lerni Esperanton, devus minimume disponi ĝeneralajn informojn pri ĝi.

Mi devas emfazi, ke multe helpis nian laboron la fakto, ke la *Korano* estas tradukita en Esperanto, precipe kompreneble ĉe la kontaktoj kun religiaj grupoj. Ankaŭ la traduko de Kajjam ludis gravan rolon. Ni verkis recenzojn perslingve pri la Esperantaj eldonoj de *Korano* kaj Kajjam, kaj tio plaĉis al la publiko, forpelante iliajn timojn, ke eble temas pri ia klopodo forigi la naciajn lingvojn kaj anstataŭigi ilin nur per Esperanto. Mi serĉis la tekston de la Unesko-rezolucio de Montevideo pri Esperanto, sed la Irana Nacia Unesko-Komisiono ne posedis ĝin, kaj mi devis peti ĝin de UEA.

Poste mi tradukis ĝin en la persan, kaj ĝi aperis en mia prelegoteksto, en mia lernolibro kaj en multaj ĵurnaloj kaj revuoj. Mi klopodis klarigi al la publiko, ke tiu grava resolucio ankoraŭ ne estas sufiĉe bone komprenita kaj prikomentita. Temas pri unika dokumento, ĉar neniam antaŭe okazis, en iu ajn internacia organizaĵo kiel UN aŭ Unesko, ke delegitoj el la tuta mondo, el ĉiaj vidpunktoj kaj politikaj sistemoj, kunsidis kaj deklaris, ke tio, kion celis kaj alstrebis unu homo (Zamenhof), estas identa kun tio, kion ili celas ĉiuj kaj kio estas enskribita en la konstitucio de Unesko. Kaj la Nacia Unesko-Komisiono sciis tute nenion pri tiu unika resolucio, tute nenion pri ĝia enhavo.


Feliĉe, ni renkontis ankaŭ multajn homojn, kiuj montris tre akcepteman sintenon. Mi povas nomi ekzemple: prof. Amir Arĝomand, kiu estis siatempe vicrektoro de la Universitato de Teherano, ankaŭ prof. Saruĥani kaj la nunan rektoron de la Universitato, d-ron Motamedi, kiu tiutempe estis la rektoro de la Universitato en Isfahan kaj ĝis antaŭ kelkaj monatoj estis ankaŭ la ministro pri supera klerigo kaj scienco. Ni bone konis unu la alian siatempe en la Ministerio de Sano. Ili multe helpis min, kiel ankaŭ ĉiuj redakcioj, kiuj estis pretaj akcepti novajn ideojn sen antaŭjuĝoj, eĉ se ili nenion sciis antaŭe pri Esperanto. Mi devas esprimi al ili ĉiuj vere sincerajn dankojn pro ilia kunlaboro.

D: Do tiu ĉi planita agado, el kiu kreskis la nuna tre rimarkebla interesiĝo en Irano, certe kostis al vi persone multege da tempo kaj energio. Kiel vi povis permesi al vi dediĉi vin tiel komplete al la afero?

R: Nu, ĝis antaŭ 3 jaroj mi estis ĝenerala direktoro pri mensa sano en la Ministerio de Sano. Samtempe mi estis profesoro pri islama sociologio en la Universitato de Teherano. Antaŭ 3 jaroj mi povis komplete liberigi min de miaj respondecoj en la ministerio kaj volis reveni ekskluzive al la universitataj laboroj, sed, kiel jam dirite, mi decidiĝis dediĉi min komplete al Esperanto, kiun mi rigardas kiel daŭrigon de miaj kulturaj, klerigaj kaj universitataj agadoj. Mian Esperantan agadon pagas neniu — male, mi eĉ elspezadas monon por ĝi kaj mi esperas, ke mi ankoraŭ longe povos tion fari. Mi estus povinta enspezi monon pro la gazetartikoloj, sed tiuokaze mi devus konformiĝi al iliaj deziroj, kaj mi preferis rezigni pri la mono kaj insisti pri la enhavo de la artikoloj. Mi opinias, ke sen tiu oferado de tempo kaj mono nenio estus atingita, kaj mi esperas, ke mi povos inspiri multajn kolegojn kaj studentojn, kiuj, kiel tria-mondanoj, malsatas je scio kaj kiuj havas tiom da neuzata energio, kiun ili povus dediĉi al io, kio estas universale akceptita kiel bona celo. Kiel vi scias, mi dum multaj jaroj laboris pri junularaj problemoj, kaj mia verko *Suferanta junularo* estas nun uzata kiel lernolibro en Irano.

D: Ĉu vi kredas, ke en aliaj landoj povos troviĝi homoj kapablaj fondi novan movadon, kiel vi, kun sama sindediĉo?

R: Mi esperas, ke en la landoj de la Tria Mondo troviĝos aliaj, kiuj estos inspiritaj de la irana ekzemplo.



Universitato de Teherano laborigas du oficistinojn, kiuj administras Esperanto-kursojn por miloj da studentoj, kiuj jam lernas aŭ volas lerni la Internacian Lingvon.

Vere, mi promesis al mi mem, ke mi dediĉos min tute al Esperanto. Mi eĉ kontraktis vivasekuron favore i.a. al UEA.

D: Ĉu vi kredas, ke pere de la agado ĉi tie en Irano la Movado povos pli bone disvastiĝi en najbarajn landojn de Proksima Oriento, precipe en la islaman mondon kaj en la arabajn landojn?

R: Mi kredas, ke jes; tamen, mi ne estas certa, kiel nek ĝis kiu grado. Iom da signoj ekzistas. Unue, kiel vi scias, ni estis kune en Gom, kaj tie, kun la afabla permeso de lia Moŝto Ajatula Ŝariatmadari — unu el la tre malmultaj ĉefgvidantoj de ŝijaismo —, ni prelegis al la studentoj. Gom estas kvazaŭ teologia fakultato de islamo. Tie instruas plejparte la gvidantoj de ŝijaismo, kaj la studentoj, kiuj venas lerni en tiaspecaj seminarioj, estas preparataj por poste fariĝi pastroj. En islamo ekzistas du sektoj: ŝijaismo (la malplimulto) kaj sunaismo (la plimulto). Ĉar Irano estas la centro de ŝijaismo, venas ĉi tien studentoj el multaj aliaj landoj, ekzemple Malajzio, Indonezio, Tajlando, Hinda Unio, Pakistano, kelkaj arabaj landoj kaj multaj afrikaj landoj. Sed, kiel vi povis mem konstati, venas studi en Gom ne nur ŝijaistoj, sed eĉ sunaistoj ankaŭ, ekzemple el Libano, Kuvajto, Baĥreĵno kaj aliaj arabaj landoj, ĉar jam de multaj jaroj okazas interproksimiĝo inter ŝijaismo kaj sunaismo. Estas do tre grave, ke ni povis prelegi al tiaj studentoj kaj veki ilian interesiĝon pri Esperanto, ĉar ili estas la estontaj religiaj gvidantoj en siaj respektivaj landoj kaj komunumoj. Precipe tiuj el la multlingvaj landoj de Afriko povas konvinkiĝi, ke siajn lingvajn problemojn ili povos solvi nur pere de Esperanto. Tio donos fruktojn nur en iom pli fora estonteco, post iom da jaroj. Aliflanke, ni jam komencis tiel nomatan orientigan kurson por iranaj diplomatoj, kiuj de tempo

al tempo revenas al Teherano, al la Instituto pri Internaciaj Rilatoj, por aktualigi siajn sciojn kaj ricevi plian trejnadon. Al ili mi jam donis enkondukajn kursojn pri Esperanto. Ankaŭ ili poste reiras al diversaj landoj kaj tie parolas pri Esperanto. Ekzemple, pasintjare venis ĉi tien profesoro el Sirio kaj demandis min, kio estas tiu Esperanto pri kiu oni parolas. Montriĝis, ke ĉe iu vespermanĝo en lia hejmo en Damasko, en ĉeesto de pluraj profesoroj kaj membroj de la Araba Akademio de Damasko, la irana konsulo, kiu estis ankaŭ invitita, rakontis, ke li ĉeestis mian enkondukan kurson pri Esperanto en Teherano. Rezulte, tiuj arabaj akademianoj tre interesiĝis kaj skribis leterojn diversloken por peti pliajn informojn pri la lingvo.

Krome, kiel vi scias, ni havas en Irano ankaŭ ĵurnalojn en la franca kaj angla lingvoj, gazetojn en la araba, en la urdua kaj aliaj lingvoj, kaj ili cirkulas ankaŭ ekster Irano. Precipe la religiaj gazetoj, eldonataj de Gom estas tre influaj en la najbaraj kaj islamaj landoj. En ĉiuj tiaj gazetoj ni nun sukcesas publikigi artikolojn kaj intervjuojn pri Esperanto. Do, se ni kredas je la potenco de la amaskomunikiloj, kaj ili ja estas nuntempe la ĉefa rimedo de internaciaj interagoj, tiam ni devas kredi, ke nia Movado irana havos influon ankaŭ alilande.

Ankaŭ en unu pedagogia altlernejo ĉi tie, kie studas multaj pakistanaj instruistoj, mi estis invitita prelegi pri Esperanto speciale por la pakistananoj. Krome, en Irano troviĝas multaj hindoj, srilankanoj kaj afrikanoj, kiuj laboras en diversaj gazeteldonejoj kaj en la fremdlingvaj servoj de la Irana Nacia Radio-Televido. Ili kutime laboras ĉi tie kelkajn monatojn aŭ unu jaron kaj poste reiras en sian landon. Ankaŭ ili plejparte nun estas informitaj pri Esperanto, kaj iuj el ili eĉ tiagrade

interesiĝis, ke ili volis mem verki artikolojn pri la temo. Resume, same tiel, kiel nia agado en Irano estas nutrata de novaĵoj pri Esperanto el aliaj mondpartoj kaj de la interesiĝo de alilandaj Esperanto-movadoj, siavice ankaŭ aliaj landoj ricevos stimulon pro la novaĵoj el Irano.

D: Pasintan jaron vi jam havis 2 500 lernantojn, kaj ankaŭ nun la enskribiĝo estas tre granda. Kiamaniere vi povas sola instrui al tiel multe da homoj?

R: Mi ĝojas, ke vi mem povis viziti kelkajn el tiuj klasoj, ĉar al multaj okcidentaj esperantistoj tiuj informoj impresas eble kiel rakonto el *Mil kaj unu noktoj*. Ni havas klasojn kun po 140-160 lernantoj kelkfoje. Tio estas ĝenerala problemo en la Tria Mondo: se vi iros en iun ajn lernejon vi trovos, ke la klasoj estas tro plenaj, kun ĝenerale ĝis 100 lernantoj en unu klaso. Ni klopodas nun redukti la nombrojn. Sed niaj Esperantaj klasoj ne ŝajnas al la lernantoj eksterordinare grandaj, ĉar pro iliaj lernejoj spertoj ili jam akceptas tiajn nombrojn. Efektive, tamen, la nombroj estas eksterordinaraj, ĉar temas pri **libervola** lernado. La interesiĝo estas tia, ke ĝenerale, se mi prelegas pri Esperanto al, ni diru, 300 personoj, el ili unu triono, do ĉirkaŭ 100, jam volas aliĝi al kurso. En la komenco de nia agado okazis, ke el klaso de 100 personoj post 3-4 semajnoj restis nur 40-50, ĉar multaj venis al ni

kaj diris: "Bedaŭrinde mi devas transloĝiĝi" aŭ "Pro la universitataj ekzamenoj mi ne povos veni dum 3 semajnoj" aŭ "Mi devas forlasi la kurson pro eksterlanda vojaĝo". Tio donis al ni motivon por cerbumi pri tio, kiamaniere ni povus ebligi al tiaj personoj tamen realiĝi al la kurso. Ni venis al la ideo, ĉiam komenci novan kurson 3 semajnojn post la komenciĝo de la antaŭa. Do tiamaniere ni faris kvazaŭ ŝtupare la kursojn, ĉiam po pluraj kursoj paralele. Tiam ni povis anonci al la kursanoj: "Se pro iu kaŭzo vi devas interrompi la frekventadon de ĉi tiu kurso, vi povos atendi 3 semajnojn kaj aliĝi al alia kurso en la sama stadio, kiun vi atingis en ĉi tiu." Inverse, se iu lernanto estis aparte brila kaj progresis multe pli rapide, ol la aliaj, li aŭ ŝi povis transsalti tri semajnojn kaj veni en pli progresintan kurson. Per tiu rimedo ni sukcesis konservi multajn lernantojn, kiuj sen tio estus forlasintaj la lernadon pro devigita interrompo aŭ pro malegala lernrapideco. Krome, laŭ tiu sistemo ni havis pretekston por anonci ĉiun trian semajnon en la gazetaro, kaj afiŝi en la universitato, ke jen ni komencos la tioman kurson de Esperanto kaj la interesitoj povas enskribiĝi por ĝi en la oficejo de la universitato. Tiel la ekzisto de la kursoj restis konstante en la atento de la publiko.


Tute konscie, mi dekomence ne provis instrui Esperanton ĝisfunde al kelkaj elektitaj lernantoj. Mi kon-

Informoj de CED

Raporto pri LPLP

ĈIU KOMENCO almenaŭ iom malfacilas. Do ankaŭ la naskiĝo de *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado* (karesnomo: *LPLP*) havis ŝvitigajn momentojn, sed la bebo, enmondiĝinte kelkajn monatojn malfrue, tamen vivas kaj sanas. *LPLP* estas la sola internacia scienca revuo pri la fenomeno: lingvaj baroj. Ĝin aŭspicias la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. Ĝi estas lingve pluropa sed prezentas en Esperanto resumon de ĉiu artikolo. Kaj, post neatendita atendo pleje kaŭzita de la subita vendiĝo de la eldonejo (Mouton) al alia eldonfirmao (Walter de Gruyter), ĝi naskiĝis ĉi-aŭtune — aŭ, pli ĝuste, renaskiĝis —, ĉar ĝi estas la sekvulo de la revuo *La monda lingvo-problemo*, kies lasta numero (vol.6, n-ro 18) aperis antaŭnelonge.

En nia januara rubriko ni anoncis la planon de CED, doni al sia revuo novan, por ne-esperantistoj pli kompreneblan titolon. Ni deklaris ambician esperon, konvinki dekojn da eminentaj sciencistoj en lingvaj



مشاكل اللغة
والصالح اللغوي

語言問題與計劃

Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado

Language Problems and Language Planning

Problèmes de politique linguistique

Sprachprobleme und Sprachplanung

भाषा समस्याएँ तथा भाषा नियोजन

Lenguas: problemas y planificación

Masalah dan Perancangan Bahasa

Языковые проблемы и языковая политика

Matatizo na mipango ya lugha

mouton

Vol. 1, n-ro 1 (= la monda lingvo-problemo,
vol. 7, n-ro 19), p. 1-64, Berlin-New York, 1977.

LPLP
vol. 1
n-ro 1



D-ro M.H. Saheb-Zamani instruas: Kiel eble plej multaj homoj havu iom da scio pri kaj de Esperanto.

statis, ke en Irano la popolo nenion scias pri Esperanto kaj pro tio emas havi antaŭjuĝojn. Do mi alprenis la strategion, kiel eble plej vaste diskonigi Esperanton, tiel ke kiel eble plej multaj homoj havu iom da scio de kaj pri Esperanto. Tial ni komencis kiel eble plej multe da kursoj. Ĝus aperis, dum via vizito, en tre influhava

virina gazeto *Zane ruz* (Hodiaŭa virino) longa, tre pozitive verkita intervjuo kun kvar sinjorinoj, kiuj lernis Esperanton, kaj el kiuj du ĉeestis (unufoje en la historio de la irana movado) la Universalan Kongreson en Rejkjaviko. Rezulte de tiu intervjuo, ni estas nun inundataj de informpetoj el la tuta lando, ĉar tiu revuo estas tre populara, eĉ inter viraj legantoj.

Tion ni faris ĝis nun, kaj mi estas konvinkita, ke eble dum du jaroj ankoraŭ ni devas sekvi tiun strategion, por daŭre disvastigadi la scion pri Esperanto. Tamen, el tio jam rezultis, ke multaj estas vere profunde interesitaj en la lingvo. Unu el ili estis s-ino Moloud Saghafian, kiu petis unujaran forpermeson de la Ministerio de Edukado, proprakoste vojaĝis al Eŭropo kaj restadis en Roterdamo, Hago, Grésillon, Paderborn kaj Parizo, kie ŝi studis kun s-ino Haudebine. Nun ŝi revenis al Irano, tre flue parolas Esperanton kaj komencis konversacian kurson por progresintoj. Entute ni nun disponas pri ĉirkaŭ 12 instruistoj de Esperanto. Ekzemple, s-ro Afšar havas nun du klasojn de Esperanto en la mezlernejo "D-ro Haŝrudi", kaj f-ino Fate-meh Moghaddas komencis kurson en alia mezlernejo, kaj ekzistas deko da aliaj, kiuj nun kapablas gvidi elementajn kursojn. Kun ilia helpo, ni do esperas ĉiam pli grandigi la nombron de kursoj.

Intervjuis: d-ro V. Sadler

fakoj, aniĝi en la Redaktan Komitaton de la revuo. Kaj ni asertis, ke tiaj ŝanĝoj helpas venki du el la ĉefaj problemoj ĝenadantaj la eldonadon: malgrando de la abonantaro kaj malsufiĉo de bonaj manuskriptoj.

Nun ni povas feliĉe raporti progreson, kie en januaro ekzistis nur planoj. Unue, la titolo ja estas ŝanĝita, kiel vi povas vidi ĉe la ĉi-apuda kovrila desegno, la nova vizaĝo de la revuo. La titolo nun aperas en 12 lingvoj: Esperanto, angla, franca, germana, hindia, hispana, malaja, rusa, ŝuahila, ĉina, japana kaj araba. Ili ĉirkaŭas geometrian simbolon, kies elementoj tradicie prasinifas "homan planlaboron ĉe la kvar anguloj de la mondo". Kvankam eble ŝajnas, ke oni povas tradukigi kvin-vortan titolon en 11 aliajn lingvojn facile, tamen unu aspekto de la monda lingva problemaro ja estas la neekzisto de tute samsignifaj vortoj en diversaj lingvoj. Do CED atendis kelkajn zorgojn ĉe la tasko.

La obstakloj tamen preteris niajn inkubojn. Kiom da nacilingvaj ekspertoj ni konsultis, tiom da titoltradukoj ni ricevis! Preskaŭ mankis konsento inter iu ajn duo da fakuloj (ĉu surprize?). Por ilustrii nian problemon, ni diru, ke estis ricevita 26 titolproponoj de kleruloj (ĉefe socilingvistoj) kies lingvo estas la franca (ĝiaj internaciigemuloj ofte deklaras tiun lingvon neordinare "preciza"). Ĉu el la kandidataj titoloj en la diversaj lingvoj ni elektis la ĝustajn? Volonte ni ricevus vian opinion pri tio. (Skribu al la aŭtoro.) Kaj, ĉu ni plej saĝe elektis 12 lingvojn el la kelkmil eventualaj kandidatoj? Ankaŭ pri tiu demando

ni ricevis diversajn konsilojn kaj bonvenigus ankoraŭ la vian. Ni tamen dubas, ĉu unike "prava" solvo ekzistas. Neniu sola vortumo en la franca aŭ alia lingvo (ankaŭ Esperanto) povas esprimi tute trafte kaj frappe la jesjaan esencon de la revuo, sen tendenco. Simile, neniu dozena fasko da lingvoj, eĉ se disregionaj, povas eviti ĉian lingvan diskriminacion. Dum ni strebas malkovri por la mondo lingvajn dilemojn, ni mem (tute nature) dilemiĝas. Sed ni certas, ke la plejmulto de fakuloj kaj bibliotekistoj en la mondo povus nun pli kompreni, pri kio temas la revuo.

Alia progreso estas la vastiĝo de la Redakta Komitato. Antaŭe 8-membra (9 kiam vivis Eugen Wüster), ĝi nun enhavas 53 elstarajn fakulojn. Malgraŭ niaj supozoj, preskaŭ ĉiu invitito konsentis redaktkomitaniĝi. Krome, ne temis pri nur "donaci sian nomon"; ĉiu nova membro devis konsenti profesie recenzi, sen pago, proponitajn manuskriptojn por la revuo. Ĉar la kvalito de la komentoj, kiuj akompanas la jeson aŭ neon al artikolproponintoj, estas unu el la ĉefaj kvalittaksiloj pri scienca periodaĵo, tiu trezoro de komentemaj ekspertoj (vidu la kadron sur p. 208) nepre helpas elstarigi *LPLP*.

Ĉu ĉio tio komencis kreskigi la abonantaron kaj alfluigi pli eminentajn manuskriptojn? La respondoj ŝajnas esti jesaj. La abonado je la kompostmomento plivigliĝas rimarkinde, kompare kun antaŭ unu jaro, malgraŭ la prokrastita ekeldoniĝo. Proksimume 200 ĉefaj bibliotekoj de la mondo estas inter la abonantoj.

Kaj la redaktoro, prof. Richard E. Wood, raportas, ke la alvenantaj studoj klare ŝanĝiĝis dum la lastaj monatoj, nun multe pli spegulante la seriozan, problem-direktitan difiniĝon de *LPLP*. Ili pritraktas lingvajn

Redakta Komitato de LPLP

Mohammed Abdulaziz
Cyril J. Adcock
Olga Akhmanova
Gilbert Ansre
Lluís Aracil
Paul Ariste
Cornelis C. Berg
Basil Bernstein
Guy Bouthillier
Janet Byron
Arthur Capell
Yuen Ren Chao
Brenda Danet
Alison d'Anglejan
Michel Duc Goninaz
Alberto Escobar
Charles A. Ferguson
Joshua A. Fishman
Vladimir I. Georgiev
Samir K. Ghosh
Howard Giles
Einar Haugen
Michael Hechter
Guy Héraud
Dell Hymes

M.I. Isaev
Björn H. Jernudd
Lachman M. Khubchandani
Rolf Kjolseth
Wolfgang Klein
Heinz Kloss
Bh. Krishnamurti
Stanley Lieberman
William F. Mackey
Ali A. Mazrui
Jacob Ornstein
Mario Pei
Fred C.C. Peng
Jonathan Pool
Fred W. Riggs
Joan Rubin
Brigitte Schlieben-Lange
Roger W. Shuy
Brian Silver
Robert N. St. Clair
Alexander Szalai
Valter Tauli
Barrie Thorne
Rudolph C. Troike
G. Richard Tucker
Albert Verdoodt
Gaston Waringhien
Stephen A. Wurm

problemojn kaj lingvo-planadon en Skandinavio, Ĉinio, Israelo, Kanado, Sud-Afriko, Hinda Unio kaj aliloke. Daŭre mankas sufiĉaj manuskriptoj pri lingvaj aspektoj de la vivo internacia, sed la redaktoro vigle serĉadas tiajn. Dume, la revuo akiris du teknikajn redaktistojn, kiuj pritraktas manuskriptojn post la akceptiĝo. Ili estas Richard Cash (Francio) kaj Eugen Rytenberg (Svedio). Ili helpas glatigi la laboron kaj liberigi la redaktoron por aliaj taskoj.

La redaktoro bezonas eltondaĵojn pri lingvaj problemoj el la monda gazetaro kaj invitas vin tiel kunlabori kun *LPLP*. Lia adreso estas: Prof. Richard E. Wood, Department of Foreign Languages, Plymouth State College, Plymouth, New Hampshire 03264, Usono. Se vi pretas traduki la tekston de abonvarbilo en vian lingvon, la aŭtoro povas sendi al vi ekzempleron en Esperanto. Estas gravege, instigi bibliotekojn aboni la revuon. Biblioteka aboniga kampanjo estas nun organizata en Norda Ameriko. CED kunlaboros kun tiuj, kiuj volas organizi similajn kampanjojn en aliaj regionoj. Kaj bonvolu ne forgesi, ke vi mem, abonante *LPLP* ekde la unua volumo (33 gld. ĉe la CO de UEA), povas apogi la laboron de CED kaj samtempe iĝi pli saĝa komprenanto pri la lingvaj problemoj de la mondo.


Jonathan Pool, estrarano de CED
Dept. of Political Science, DO-30
University of Washington
Seattle, Washington 98195, Usono



La unua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estas jam de jardekoj elĉerpita, la dua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estas nun prilaborata, sed oni atendas ĝian aperigon ankoraŭ plurajn jarojn. Feliĉe, ekzistas **ESPERANTO EN PERSPEKTIVO**, kiu estas la movada

enciklopedio de la nuna tempo

Fakuloj epitetoj ĝin jene: monumenta enciklopedia verkego (Waringhien), epopeo (Pool), giganta trezoro (Blanke), senprecedenca entreprenado (Régulo), kvazaŭ streĉa romano (Wells).



Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.



FOTO-SERVO PRI ZAMENHOF:

Granda galerio de Henk Thien

TRI LINIOJ en la Jarlibro 1977 (p.17) dediĉigas al "Foto-servo pri Zamenhof". Tiuj tri linioj ripetigas de jaro al jaro samloke kaj estas la sola atentigo, post la apero de la CED-dokumento — CED/INT./15 — en 1962, pri grandioza laboro kaj la plej kompleta kolekto de Zamenhof-fotoj. S-ro Henk Thien, kiu en la jarlibra mencio estas notita kiel "administranto", efektive ne estas nur tio. Li estas la kolektinto, nome kiu savis la fotojn de plena senspuriĝo, almenaŭ tiujn, kiuj estis ankoraŭ saveblaj. Ni vizitis lin dufoje dum la lasta duonjaro kaj decidiĝis dediĉi al li kaj lia kolekto almenaŭ kelkajn pliajn liniojn ol en la Jarlibro.

S-ro Thien lernis Esperanton antaŭ 46 jaroj, ĉar, kiel li mem diras, ne trovinte laboron kiel ĵus diplomita instruisto, li "devis ion fari". En 1936 li iris al Francio kaj Belgio por instrui Cseh-metode Esperanton dum tri jaroj. Li poste restadis en Svislando kaj provis tie instruistiĝi, sed venis la milito, li devis reiri al Nederlando kaj baldaŭ troviĝis en la brita armeo. Lacigita de siaj provoj instruistiĝi, li eklaboris ĉe la nederlanda flugkompanio KLM, kie li antaŭ kelkaj jaroj pensiigis kiel ĉefinspektoro. Tie li iom povis mildigi sian denaskan instru-soifon. Li faras tion ankaŭ nun instruante la francan, anglan kaj nederlandan (al gast-laboristoj, por kiuj li verkis lernolibron).

Sed, lia kolekto, kiel ĝi estiĝis? En 1957, diras s-ro Thien, rigardante dise tra la eldonaĵoj Zamenhof-fotojn, li decidis, ke li "devas ion fari". Li ekverkis kelkcenton da leteroj, faris kelkdekon da vojaĝoj kaj investis milojn da guldenoj kaj la rezulto — ĉ. 300 Zamenhof-fotoj. Ne temas pri kolekto de flaviĝintaj, disfalantaj paperoj! Amika fotisto surfilmigis ĉion, reproduktis la malnovaĵojn, kaj s-ro Thien — pagis. Li havas ankaŭ centon da diapozitivoj pri Zamenhof. Siatempo, s-ro Thien liveris la plimulton de fotoj por *Memorlibro pri la Zamenhof-jaro kaj Granda galerio Zamenhofs*, kion oni en la lasta verko forgesis danki. Li planas publikigi fotoalbumon pri Zamenhof kaj, kompreneble, mem financi ĝin. Lia nomo ligiĝas al "dek" en la nederlanda, li klarigas. Juste, ni aldonas, ĉar s-ro Thien valoras kiel dek homoj.

sm



S-ro Henk Thien: Mi donacos la tutan kolekton de la Foto-servo pri Zamenhof al la Biblioteko de UEA.

Vastaj horizontoj

Vastaj horizontoj estas la titolo de libreto, pri kiu vi jam povis legi en la listo de nove aperintaj libroj en ĉi tiu revuo. Tamen ne en la internacia lingvo, sed en ses naciaj lingvoj. Temas pri eldono de Skolta Esperanto-Ligo (SEL), kiu havis tre bonan akcepton en la skolta movado. Jam aperis eldonoj en la angla, franca, germana, japana, nederlanda kaj norvega lingvoj, kaj baldaŭ aperos eldonoj en la hispana kaj kataluna lingvoj.

De diversaj flankoj SEL ricevis laŭdon pro la enhavo kaj aspekto de la broŝuro, de kiu ĉiu nacia skoltasocio ricevis ekzempleron. La aspekto estas moderna kaj plaĉas al multaj. La enhavo subtenas la oficialajn programojn de la du skoltaj mondaj organizaĵoj por instigi siajn membrojn al pli multa kaj pli bona internacia aktiveco.

Fundamenta ideo de la eldono estas, ke nura varbado por Esperanto ne tiom valoras. Inter multaj aliaj ideoj, konsiloj kaj sugestoj la libreto nur atentigas pri la valoro de Esperanto kaj SEL fidas, ke por tiuj, kiuj komprenas tiun valoron, varbado ne plu necesas. La rezultoj pruvis la ĝustecon de tiu ideo!

SEL lerte utilis la donacon de ĉ. 5 000 guldenoj, kiun ĝi ricevis pere de la Financa Programo de la Esperanto-movado en la jaro 1975. Ankaŭ la fakto ke la ĝenerala sekretario de la Monda Skolta Organizaĵo en Ĝenevo verkis la antaŭparolon multe kontribuis al la bona akcepto de la libreto. La suma eldonkvanto nun estas 10 000 ekzempleroj, kaj tiuj, kiuj jam vendiĝis, montriĝis bonaj varbiloj por Esperanto.

Kontenta la estraro de SEL tamen ne estas. Samtempe kun la unua aktiveco pro la libreto, oni konstatis, ke la ĉefa maniero por konatigi al skoltoj Esperanton estas la prezentado de la libreto en skoltaj (internaciaj) kunvenoj. Tio signifas, ke la kunlaboro estas necesa de multaj bonvolaj esperantistoj, kiuj havas iajn rilatojn kun skoltado, kaj tiuj certe ne abundas. La mono, kiu per la vendado revenas en la kason de SEL, utiliĝos por

la reeldono de la skolta lernolibro *Ĵamborea lingvo* de kiu intertempe jam ĉirkaŭ 8 000 ekzempleroj vendiĝis. SEL ĝojas ankaŭ pro la fakto, ke ĝi povis senpage sendi centojn da lernolibroj al landoj en la Tria Mondo, pro la enspezoj de sia nuna aktiveco.

Granda espero estas ankoraŭ prizorgi la eldonon de la nova libreto en la araba lingvo, ĉar tiu multe povus kontribui al la disvastigo de Esperanto, kiam en la jaro 1979 okazos la 15a Monda Ĵamboreo en Irano. Kompreneble, SEL bonvenigas ĉiun, kiu povas helpi en la vendado de la libreto inter geskoltoj. Tio nepre validas ankaŭ por tiuj, kiuj vivas en nepagipovaj landoj. Ili fidu la skoltan solidarecon, kiu certe trovos manieron por helpi ilin.

jkh



Kastoroj kaj onkloj

GEONKLOJ ESPERANTISTAJ en la jaro 1978 festos sian 20an "naskiĝtagon", kaj ĝia pli juna frato, la KASTORA KLUBO de ESPERANTO, notos sian 14an datrevenon. La pli aĝa organizaĵo jam trovis "geonklojn" alilandajn por pli ol 1100 infanoj en 28 landoj, kaj la pli juna akceptis pli ol 800 membrojn en 22 landoj, kun aktuala membraro de 215.

Bedaŭrinde ambaŭ servoj al la infanoj estas en danĝero de pereco, pro la ĉiam plialtiĝantaj kostoj. Ĉar la plimulto de ĝiaj membroj ne havas eblecon sendi monon trans limojn, la KASTORA KLUBO ne postulas kotizon, sed dependas de donacoj de bonvolaj esperantistoj. Tamen por fariĝi provizora membro (kastoreto) infano devas lerni por poste ricevi insignon kaj iĝi plenrajta membro, kun ebleco progresi ĝis Ora Kastoro. Sed la kosto de insignoj plialtiĝis per 60% en du jaroj, kaj la poŝtkostoj plialtiĝis per 83%. Dum la pasintaj du jaroj niaj elspezoj grave superis niajn enspezojn; (en 1976-77 ili estis duoblaj kompare al la antaŭa lernojaro).

Se vi kredas, ke ĉi tiuj du servoj (priskribitaj en la Jarlibro de UEA 1977, p. 57 kaj 59) valoras vian subtenon, la fondinto kaj administranto kore petas tion. Mondonacoj, grandaj aŭ malgrandaj, estos danke akceptitaj. Kompreneble la administranto tre volonte sendos plenajn detalojn pri la servoj kontraŭ peto, kaj atendas la okazon helpi pliajn infanojn en ĉiuj landoj. Liaj nomo kaj adreso estas:

J. H. Sullivan, 3 Berwick Avenue,
Urmston, Manchester, M31 1PS, Britujo.



Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo



Rekomendo pri Edukado por Internaciaj Kompreniĝo, Kunlaboro kaj Paco kaj Edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj

akceptita de la Ĝenerala Konferenco en ĝia dek-oka sesio
Parizo, la 19an de novembro 1974

La Ĝenerala Konferenco de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo, kunvenante en Parizo de la 17-a de oktobro ĝis la 23-a de novembro 1974, en sia dek-oka sesio,

Konscia pri la respondeco propra al Ŝtatoj, ke ili atingu per edukado la celojn esprimatajn en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la Statuto de Unesko, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj la Ĝenevaj Konvencioj por la Protekto de Viktimoj de Milito de la 12-a de aŭgusto 1949, por antaŭenigi internaciajn kompreniĝon, kunlaboron kaj pacon kaj respekton al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj,

Rekonfirmante la respondecon propran al Unesko, ke ĝi akcelu kaj subtenu iun ajn agadon de Ŝtatoj-Membroj, kiu celas garantii la edukadon de ĉiuj homoj por la antaŭenigo de justeco, libereco, homaj rajtoj kaj paco,

Notante tamen, ke la agado de Unesko kaj ĝiaj Ŝtatoj-Membroj foje havas efikon nur je malgranda malplimulto de la kreskantaj nombroj da lernejoj, studentoj, gejunuloj kaj plenaĝuloj daŭrigantaj sian edukadon, kaj edukistoj, kaj ke la studprogramoj kaj metodoj de internacia edukado ne ĉiam respondas al la bezonoj kaj aspiroj de la partoprenantoj junaj kaj plenaĝaj,

Notante cetere, ke en pluraj kazoj ankoraŭ estas granda malegalo inter proklamitaj idealoj, deklaritaj intencoj kaj la efektiva situacio,

Decidinte, dum sia dek-sepa sesio, ke tia edukado estu temo de rekomendo al la Ŝtatoj-Membroj,

Akceptas, en tiu ĉi dek-naŭa tago de novembro 1974, la jenan rekomendon.

La Ĝenerala Konferenco rekomendas, ke la Ŝtatoj-Membroj apliku la ĉi-sekvajn rimedojn per tiaj leĝaj aŭ aliaj paŝoj, kiuj estas eventuale bezonataj, konforme al la konstitucia praktiko de ĉiu Ŝtato, por efektivi en siaj respektivaj teritorioj la principojn prezentitajn en tiu ĉi rekomendo.

La Ĝenerala Konferenco rekomendas, ke la Ŝtatoj-Membroj atentigu pri tiu ĉi rekomendo la aŭtoritatojn, departementojn aŭ instancojn respondecajn pri lerneja edukado, supera edukado kaj eksterlerneja edukado, la diversajn organizojn, kiuj plenumas edukon laboron inter gejunuloj kaj plenaĝuloj, kiel ekzemple studentajn kaj junularajn movadojn, asociojn de gepatroj de lernejoj, instruistajn sindikatojn, kaj aliajn interesatojn.

La Ĝenerala Konferenco rekomendas, ke la Ŝtatoj-Membroj submetu al ĝi, ĝis datoj kaj en formo decidota de la Konferenco, raportojn pri la agado, kiun ili plenumis kiel sekvon de tiu ĉi rekomendo.

I. Signifo de terminoj

1. Por la celoj de tiu ĉi rekomendo

- (a) La vorto 'edukado' implicas la kompletan procedon de la socia vivo, laŭ kiu individuoj kaj sociaj grupoj konscie lernas evoluigi interne de, kaj por la bono de, la nacia kaj internacia komunumoj, la tuton de siaj personaj kapabloj, sintenoj, lertoj kaj scioj. La procedo ne estas limigita al iuj specifaj agadoj.
- (b) La terminojn 'internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco' oni konsideru kiel nedivideblan tuton bazitan sur la principo de amikaj rilatoj inter popoloj kaj Ŝtatoj havantaj diversajn sociajn kaj politikajn sistemojn, kaj sur la respekto al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. En la teksto de tiu ĉi rekomendo, la diversaj signifoj de tiuj terminoj estas foje kunigitaj en koncizan esprimon, 'internacia edukado'.
- (c) 'Homaj rajtoj' kaj 'fundamentaj liberecoj' estas tiuj difinitaj en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj la Internaciaj Konvencioj pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, kaj pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj.

II. Kampo de aplikado

- 2. Tiu ĉi rekomendo aplikiĝas al ĉiuj stadioj kaj formoj de edukado.

III. Gvidaj principoj

- 3. La edukado estu inspirita de la celoj kaj intencoj formulitaj en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la Statuto de Unesko kaj la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, precipe la artikolo 26, paragrafo 2, de ĉi-lastata, kiu tekstas: 'Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasaj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝintaj Nacioj por konservo de paco'.
- 4. Por ebligi al ĉiu persono aktive kontribui al la plenumo de la celoj aluditaj en la paragrafo 3 kaj por antaŭenigi internaciajn solidarecon kaj kunlaboron — aferoj nepraj en la solvado de tiuj mondaj problemoj, kiuj tuŝas la vivon de individuoj kaj komunumoj kaj ties uzadon de fundamentaj rajtoj kaj liberecoj — oni konsideru la jenajn celojn gravaj gvidaj principoj de eduka politiko:
 - (a) internacia dimensio kaj universala perspektivo en edukado je ĉiuj ties niveloj kaj formoj;
 - (b) kompreno kaj respekto por ĉiuj popoloj, iliaj kulturoj, civilizoj, valoroj kaj vivmanieroj, inkluzive enlandajn etnajn kulturojn kaj kulturojn de aliaj nacioj;
 - (c) konscio pri la kreskanta tutmonda interdependo inter popoloj kaj nacioj;
 - (d) kapablo komuniki kun aliaj homoj;
 - (e) konscio ne nur pri la rajtoj sed ankaŭ pri la devoj propraj al individuoj, sociaj grupoj kaj nacioj inter si;
 - (f) kompreno pri la neceso de internaciaj solidareco kaj kunlaboro;
 - (g) preteco de la individuo partopreni en solvado de la problemoj de sia komunumo, sia lando kaj la mondo ĝenerale.
- 5. Kombinante lernadon, trejnadon, informadon kaj agadon, internacia edukado akcelu taŭgan intelektan kaj emocian evoluon en la individuo. Ĝi evoluigu senton de socia respondeco kaj de solidareco kun mal-

pli privilegiaj grupoj kaj ĝi konduku al observo de la principoj de egaleco en la ĉiutaga konduto. Ĝi ankaŭ helpu evoluigi kvalitojn, lertojn, kaj kapablojn, kiuj ebligas al la individuo: akiri kritikan komprenon pri problemoj sur niveloj nacia kaj internacia; kompreni kaj ekspliki faktojn, opiniojn kaj ideojn; labori kolektive; akcepti kaj partopreni liberajn diskutojn; observi la elementajn regulojn de proceduro aplikeblajn al ĉiu ajn diskuto; kaj bazi valorjuĝojn kaj decidojn sur racia analizo de ĉiuj koncernaj faktoj kaj faktoroj.

6. Edukado emfazu, ke estas neakcepteble ek militi cele al ekspansio, agreso kaj dominado, aŭ ekuzi forton kaj perforton cele al subpremado; kaj ĝi igu ĉiun personon kompreni kaj alpreni siajn respondecojn en la konservado de la paco. Ĝi kontribuu al internacia kompreniĝo kaj plifortigo de la monda paco, kaj al agado en la lukto kontraŭ koloniismo kaj novkoloniismo en ĉiuj ties formoj kaj manifestiĝoj, kaj kontraŭ ĉiuj formoj kaj manifestiĝoj de rasismo, faŝismo kaj apartismo, kiel ankaŭ kontraŭ aliaj ideologioj, kiuj naskas malamon kontraŭ nacioj kaj rasoj kaj kontraŭas la celojn de tiu ĉi rekomendo.

IV. Naciaj politikoj, planado kaj administrado

7. Ĉiu Ŝtato-Membro formulu kaj apliku naciajn politikojn, kiuj celu plialtigi la efikecon de edukado en ĉiuj ĝiaj formoj kaj plifortigi ĝian kontribuon al internacia kompreniĝo kaj kunlaboro, al konservo kaj evoluigo de justa paco, al la starigo de socia justeco, al respekto kaj apliko de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kaj al eliminado de tiuj antaŭjuĝoj, miskonceptoj, malegalecoj kaj ĉiuj maljustoj, kiuj malhelpas atingon de tiuj celoj.
8. La Ŝtatoj-Membroj, kunlabore kun la Naciaj Komisionoj, entreprenu paŝojn por certigi kunlaboron inter ministerioj kaj instancoj kaj kunordigon de iliaj klopodoj plani kaj plenumi komunajn agadprogramojn pri internacia edukado.
9. La Ŝtatoj-Membroj disponigu, harmonie kun siaj konstituciaj preskriboj, la financan, administran, materialan kaj moralan subtenon necesan por plenumi tiun ĉi rekomendon.

V. Apartaj aspektoj de lernado, trejnado kaj agado

Etikaj kaj civitaj aspektoj

10. La Ŝtatoj-Membroj entreprenu taŭgajn paŝojn por plifortigi kaj evoluigi en la lernado kaj trejnado sintenojn kaj konduton bazitajn sur rekono de la egaleco kaj nepra interdependo de nacioj kaj popoloj.
11. La Ŝtatoj-Membroj entreprenu paŝojn por certigi, ke la principoj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj la Internacia Konvencio por la Eliminado de Ĉiuj Formoj de Rasa Diskriminacio fariĝu integra parto de la evoluanta personeco de ĉiu infano, adoleskulo, junulo aŭ plenaĝulo, aplikante tiujn principojn en la ĉiutaga realigo de edukado je ĉiuj niveloj kaj formoj, kaj tiel ebligante al ĉiu individuo kontribui persone al la renovigo kaj plivastigo de edukado laŭ la indikita direkto.
12. La Ŝtatoj-Membroj instigu edukistojn, kunlabore kun lernantoj, gepatroj, la koncernaj organizoj kaj la komunumo, uzi metodojn, kiuj elvokas la kreaŭ imagopovon de infanoj kaj adoleskuloj kaj iliajn sociajn aktivecojn, kaj tiel pretigas ilin praktiki siajn rajtojn kaj liberecojn (samtempe rekonante kaj respektante la rajtojn de aliaj), kaj plenumi siajn sociajn devojn.
13. La Ŝtatoj-Membroj antaŭenigu, je ĉiu stadio de edukado, aktivan civitan trejnadon, kiu ebligas al ĉiu persono ekkoni la funkciadon kaj laboron de publikaj institucioj, lokaj, naciaj, kaj internaciaj; konatiĝi kun la procedoj por solvi fundamentajn problemojn; kaj partopreni la kulturan vivon de la komunumo kaj publikajn aferojn. Kie eble, tiu partopreno kunligu ĉiam pli firme edukadon kaj agadon por solvi problemojn sur niveloj loka, nacia kaj internacia.
14. Edukado inkluzivu kritikan analizon de la historiaj kaj nuntempaj faktoroj ekonomiaj kaj politikaj, kiuj fundamentas la kontraŭdirojn kaj tensiojn inter la landoj, kaj studadon de rimedoj por venki tiujn kontraŭdirojn, kiuj estas la efektivaj obstakloj al kompreniĝo, vera internacia kunlaboro kaj evoluigo de monda paco.
15. Edukado emfazu la verajn interesojn de la popoloj, kaj ilian nekongruon kun la interesoj de monopolemaj grupoj tenantaj ekonomian kaj politikan povon, kiuj praktikas ekspluatadon kaj ĝermigas la militon.

16. Partopreno de studentoj en la organizado de studoj kaj de la edukaj institucioj, kiujn ili frekventas, estu mem konsiderata kiel faktoro en civita edukado kaj grava elemento en internacia edukado.

Kulturaj aspektoj

17. La Ŝtatoj-Membroj antaŭenigu, en diversaj stadioj kaj diversaj specoj de edukado, studadon de diversaj kulturoj, iliaj reciprokaj influoj, iliaj perspektivoj kaj vivmanieroj, por instigi reciprokan konscion pri la malsamecoj inter ili. Tia studado devus, interalie, doni taŭgan gravecon al la instruado de la lingvoj kaj pri la civilizoj kaj la kultura heredaĵo de aliaj landoj, por antaŭenigi internacian kaj interkulturan kompreniĝon.

Studado pri la ĉefaj problemoj de la homaro

18. Oni direktu edukadon al (a) la forigo de kondiĉoj, kiuj daŭrigas kaj pligravigas la grandajn problemojn ligitajn al la homaj pluvivo kaj bonfarto – malegaleco, maljusteco, internaciaj rilatoj bazitaj sur perforto – kaj al (b) agoj de internacia kunlaborado, kiuj povas solvi ilin. Edukado, kiu ĉi-rilate nepre devas esti interdisciplina, rilatu al tiaj problemoj, kiel la jenaj:
- (a) egalrajteco de ĉiuj popoloj, kaj la rajto de la popoloj decidi pri si mem;
 - (b) la konservado de paco; diversaj specoj de milito kaj iliaj kaŭzoj kaj efikoj; malarmado; la nepermeseblo utiligi sciencojn kaj teknikojn por militaj celoj, kaj ilia utiligo cele al paco kaj progreso; la naturo kaj efiko de ekonomiaj, kulturaj kaj politikaj rilatoj inter la landoj kaj la graveco de internacia juro por tiuj rilatoj, precipe por la konservado de paco;
 - (c) agado celanta la praktikon kaj observon de homaj rajtoj, inkluzive tiujn de rifuĝintoj; rasismo kaj ĝia forigo; la lukto kontraŭ diskriminacio en ĝiaj diversaj formoj;
 - (d) ekonomia kresko kaj socia evoluo, kaj ilia rilato al socia justeco; koloniismo kaj malkoloniigo; rimedoj por helpi evolulandojn; la lukto kontraŭ analfabeteco; la kampanjo kontraŭ malsano kaj malsato; la batalo por pli bona vivokvalito kaj kiel eble plej alta nivelo de saneco; kresko de enloĝantaro kaj rilataj demandoj;
 - (e) la utiligo, regado kaj konservado de naturaj rimedoj; polucio de la homa medio;
 - (f) konservado de la kultura heredaĵo de la homaro;
 - (g) la rolo kaj agmaniero de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj en klopodoj por solvi tiajn problemojn, kaj eblecoj por plifortigi kaj antaŭenigi ĝian agadon.
19. Oni faru paŝojn por evoluigi la studadon de tiuj sciencoj kaj kampoj, kiuj rekte rilatas la praktikon de la ĉiam pli diversaj devoj kaj respondecoj ligitaj al internaciaj rilatoj.

Aliaj aspektoj

20. La Ŝtatoj-Membroj instigu edukajn instancojn kaj edukistojn doni al edukado planita laŭ tiu ĉi rekomendo interdisciplinan, problemorientitan enhavon adaptitan al la komplikeco de la demandoj ligitaj al aplikado de homaj rajtoj kaj al internacia kunlaboro, kaj mem ilustrantan la ideojn de reciprokaj influo, subteno kaj solidareco. Tiaj programoj estu bazitaj sur adekvataj esploroj, eksperimentado kaj identigo de specifaj edukaj celoj.
21. La Ŝtatoj-Membroj penu certigi, ke internacia eduka aktivado ricevu specialajn atenton kaj rimedojn, kiam ĝi okazos en sociaj situacioj aparte delikataj aŭ eksplodemaj: en situacioj, ekzemple, kie ekzistas evidentaj neegalecoj de alireblo al edukado.

VI. Agado en diversaj edukaj sektoroj

22. Oni pli forte klopodu evoluigi kaj inspiri internacian kaj interkulturan dimension en ĉiuj stadioj kaj ĉiuj formoj de edukado.
23. La Ŝtatoj-Membroj profitu el la spertoj de la Asociiĝintaj Lernejoj, kiuj plenumas, helpe de Unesko, programojn pri internacia edukado. Ŝarĝitoj pri Asociiĝintaj Lernejoj en Ŝtatoj-Membroj fortigu kaj renovigu siajn klopodojn plivastigi la programon al aliaj edukaj institucioj kaj laboru por atingi ĝeneralan

aplikon de ĝiaj rezultoj. En la aliaj Ŝtatoj-Membroj, oni komencu similan agadon kiel eble plej baldaŭ. Oni ankaŭ studu kaj disvastigu la spertojn de aliaj edukaj institucioj, kiuj plenumis sukcese programojn pri internacia edukado.

24. En la antaŭlerneja edukado, tiom, kiom ĝi disvolviĝas, la Ŝtatoj-Membroj stimulu agadon, kiu respondas al la celoj de la rekomendo, ĉar bazaj sintenoj, ekzemple pri raso, ofte formiĝas dum la antaŭlernejaj jaroj. Tiurilate necesas konsideri la gepatran sintenon kiel esencan faktoron en la edukado de infanoj; kaj la plenaĝula edukado menciita en la paragrafo 30 dediĉu apartan atenton al la pretigo de gepatroj por ilia rolo en la antaŭlerneja edukado. La unua lernejo estu planita kaj organizita kiel socia medio kun propraj karaktero kaj valoroj, en kiu diversaj situacioj, inkluzive ludojn, ebligu al la infanoj konsciigi pri siaj rajtoj, libere pretendi siajn rajtojn, samtempe akceptante siajn respondecojn, kaj plibonigi kaj plivastigi per rektaj spertoj sian senton de aparteno al ĉiam pli vastaj komunumoj — la familio, la lernejo, kaj poste la loka, nacia kaj monda komunumoj.
25. La Ŝtatoj-Membroj instigu la koncernajn instancojn, kiel ankaŭ instruistojn kaj studentojn, reekzameni de tempo al tempo kiel plibonigi la altlernejan kaj universitatan edukadon por pli plene kontribui al la atingoj de la celoj de tiu ĉi rekomendo.
26. Supera edukado inkluzivu civitan edukadon kaj lernadon por ĉiuj studentoj. Tio akriĝu ilian scion pri ĉefaj problemoj, kiujn ili helpu solvi. Ĝi ebligu al ili rektan kaj daŭran agadon cele al solvo de tiuj problemoj, kaj plibonigu ilian senton de internacia kunlaboro.
27. Ĉar superaj edukaj institucioj, precipe universitatoj, servas kreskantan nombron da homoj, ili plenumu programojn pri internacia edukado kiel parton de sia plivastigita funkcio en dumviva edukado, kaj en sia tuta instruado ili prenu universalecan perspektivon. Utiligante ĉiujn disponeblajn komunikrimedojn, ili disponigu okazojn, lernrimedojn, kaj agadon adaptitajn al la veraj interesoj, problemoj kaj aspiroj de la homoj.
28. Por evoluigi la studadon kaj praktikadon de internacia kunlaboro, superaj edukejoj sisteme profitu el la formoj de internacia agado propraj al iliaj roloj, kiel ekzemple vizitoj de eksterlandaj profesoroj kaj studentoj kaj profesia kunlaboro inter profesoroj kaj esplorgupoj en diversaj landoj. Precipe oni realigu studojn kaj eksperimentajn laborojn pri la lingvaj, sociaj, emociaj kaj kulturaj obstakloj, tensioj, sintenoj kaj agadoj, kiuj influas ĉe kaj alilandaj studentoj kaj la institucioj, kiuj gastigas ilin.
29. Ĉiu stadio de specialigita profesia trejnado inkluzivu trejnadon, kiu ebligu al studentoj kompreni sian rolon kaj tiun de siaj profesioj en evoluigo de sia socio, antaŭenigo de internacia kunlaboro, kaj konservo kaj evoluigo de paco, kaj aktive ekludi sian rolon kiel eble plej frue.
30. Kiaj ajn estu la celoj kaj formoj de eksterlerneja edukado, inkluzive plenaĝulan edukadon, ili baziĝu sur la jenaj konsideroj:
 - (a) tiom, kiom eblas, oni apliku universalecan aliron en ĉiuj eksterlernejaj edukprogramoj, kiuj enhavu la taŭgajn moralajn, civitajn, kulturajn, sciencajn kaj teknikajn elementojn de internacia edukado;
 - (b) ĉiuj koncernatoj kunordigu siajn klopodojn por orienti kaj uzi la amasmediojn de komunikado, mem-edukado kaj reciproka instruado, kaj tiajn instituciojn, kiaj estas muzeoj kaj publikaj bibliotekoj, por transdoni taŭgajn sciojn al la individuo, por kulturi en li aŭ ŝi favorajn sintenojn kaj pretecon pozitive agi, kaj por disvastigi scion kaj komprenon pri la edukaj kampanjoj kaj programoj planitaj laŭ la celoj de tiu ĉi rekomendo;
 - (c) la koncernatoj, ĉu publikaj ĉu privataj, klopodu eluzi favorajn situaciojn kaj okazojn (ekzemple, la sociajn kaj kulturajn agadojn de junularaj centroj kaj kluboj, kulturaj centroj, komunumaj centroj aŭ sindikatoj), junularajn renkontiĝojn kaj festivalojn, sportajn eventojn, kontaktojn kun eksterlandaj vizitantoj, studentoj aŭ enmigrintoj, kaj hominterŝanĝojn ĝenerale.
31. Oni faru paŝojn por helpi starigi kaj evoluigi organizojn, kiel ekzemple studentajn kaj instruistajn asociojn por Unuiĝintaj Nacioj, klubojn pri internaciaj rilatoj kaj Unesko-Klubojn, kiuj estu ligitaj al preparado kaj realigo de kunordigitaj programoj de internacia edukado.
32. La Ŝtatoj-Membroj klopodu certigi, ke, je ĉiu stadio de en- kaj eksterlerneja edukado, oni kunordigu agadon direktitan al la celoj de tiu ĉi rekomendo por formi koheran tuton interne de la studprogramoj de la diversaj niveloj kaj specoj de edukado, lernado kaj trejnado. La principoj de kunlaboro kaj asociiĝo propraj al ĉi tiu rekomendo estu aplikataj en ĉiu eduka agado.

VII. Preparado de instruistoj

33. La Ŝtatoj-Membroj konstante plibonigu la rimedojn kaj procedojn por prepari kaj diplomi instruistojn kaj aliajn edukistojn por ilia rolo en sekvado de la celoj de tiu ĉi rekomendo; tiucele:
- (a) ili motivigu instruistojn por ilia posta laboro, kreante en ili: sindediĉon al la etiko de homaj rajtoj kaj al la celo ŝanĝi la socion tiel, ke homaj rajtoj estu praktikataj; konscion pri la fundamenta unueco de la homaro; kapablon inspiri aprezon de la riĉoj, kiujn la diverseco de kulturoj povas alporti al ĉiu individuo, grupo aŭ nacio;
 - (b) ili provizu bazan interdisciplinan scion pri mondaj problemoj kaj la problemoj de internacia kunlaboro, interalie per laboro por solvi tiujn problemojn;
 - (c) ili pretigu la instruistojn mem por ludi aktivan rolon en elpenso de programoj pri internacia edukado kaj de edukaj iloj kaj materialoj, prenante en konsideron la aspirojn de la lernantoj kaj proksime kunlaborante kun ili;
 - (d) ili realigu eksperimentojn pri utiligo de aktivaj edukaj metodoj kaj trejnadon almenaŭ pri elementaj metodoj de pritakso, precipe tiuj aplikeblaj al la socia konduto kaj sintenoj de infanoj, adoleskuloj kaj plenaĝuloj;
 - (e) ili evoluigu lertojn kaj kompetentojn ĉe la instruistoj, kiel ekzemple: deziron kaj kapablon krei novajn procedojn en la edukado kaj daŭrigi la propran trejnadon; sperton pri grupa kunlaborado kaj pri interdisciplinaj studoj; scion pri grupdinamiko; kaj la kapablon krei kaj ekspluati favorajn okazojn;
 - (f) ili faciligu la studon de eksperimentoj pri internacia edukado, precipe novaj ideoj eksperimentitaj en aliaj landoj, kaj donu al la koncernatoj, kiel eble plej grandskale, okazojn por rekte kontakti kun eksterlandaj instruistoj.
34. La Ŝtatoj-Membroj donu al ŝarĝitoj pri direktado, kontrolado aŭ gvidado — ekzemple inspektoroj, edukaj konsilistoj, estroj de instruistaj seminarioj, kaj organizistoj de eduka agado por gejunuloj kaj plenaĝuloj — trejnadon, informojn kaj konsilojn, kiuj ebligu al ili helpi instruistojn labori laŭ la celoj de tiu ĉi rekomendo, prenante en konsideron: la aspirojn de gejunuloj rilate al internaciaj problemoj, kaj novajn edukmetodojn, kiuj povas plibonigi la perspektivojn por plenumo de tiaj aspiroj. Tiucele, oni organizu seminariojn aŭ perfektigajn kursojn pri internacia kaj interkultura edukado por kunigi edukajn instancojn kun la instruistoj; aliaj seminarioj aŭ kursoj povus renkontigi funkciulojn kaj instruistojn kun aliaj koncernaj grupoj, ekzemple gepatroj, studentoj, aŭ instruistaj asocioj. Ĉar devas okazi laŭstupa sed profunda ŝanĝo en la rolo de edukado, la rezultoj de eksperimentoj pri reformo de strukturoj kaj hierarkiaj rilatoj en edukaj institucioj trovu respegulon en trejnado, informado kaj konsiloj.
35. La Ŝtatoj-Membroj klopodu certigi, ke eventualaj programoj por plia trejnado de laborantaj instruistoj aŭ por respondeculoj pri direktado enhavu komponentojn de internacia edukado kaj okazojn por interkompari la rezultojn de iliaj spertoj pri tia edukado.
36. La Ŝtatoj-Membroj stimulu kaj faciligu pedagogiajn studojn kaj renovigajn kursojn en eksterlando, precipe per donado de stipendioj, kaj stimulu rekonon de tiaj kursoj kiel parto de la regula procedo de komenca trejnado, enoficigo, renoviga trejnado kaj promociado de instruistoj.
37. La Ŝtatoj-Membroj organizu aŭ helpu dudirektajn instruistajn interŝanĝojn je ĉiuj niveloj.

VIII. Edukaj iloj kaj materialoj

38. La Ŝtatoj-Membroj intensigu siajn klopodojn por faciligi la renovigon, produktadon, disvastigon kaj interŝanĝon de iloj kaj materialoj por internacia edukado, aparte atentante la fakton, ke en multaj landoj lernejoj kaj studentoj ricevas la plejparton de sia scio pri internaciaj aferoj pere de la amasmedioj ekster la lernejo. Por plenumi la bezonojn esprimatajn de tiuj, kiujn koncernas la internacia edukado, oni koncentru la fortojn al forigo de la manko de instruiloj kaj plibonigo de ilia kvalito. Tia agado sekvu la jenajn liniojn:
- (a) oni taŭge kaj konstrue utiligu la tutan gamon de haveblaj instruiloj kaj helpiloj, ekde lernolibroj ĝis televido, kaj de la nova eduka tekniko;
 - (b) en la instruado troviĝu elemento de edukado pri la amasmedioj por helpi la lernantojn elekti kaj analizi la informojn peratajn de la amasmedioj;

- (c) oni utiligu en libroj kaj ĉiuj aliaj lerniloj tutmondecan perspektivon, enkondukante en ilin internaciajn elementojn, kiuj povas servi kiel kadro por prezenti lokajn kaj naciajn aspektojn de diversaj temoj kaj kiuj ilustras precipe la sciencan kaj kulturan historion de la homaro — kun adekvata atento al la valoro de la vidaj artoj kaj muziko kiel faktoroj favoraj al kompreniĝo inter diversaj kulturoj;
 - (d) helpe de informoj disponigitaj de Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj aliaj Specialigitaj Institucioj, oni pretigu en la lingvo aŭ lingvoj de instruado de la koncerna lando skribajn kaj aŭdvidajn materialojn de interdisciplina karaktero, kiuj ilustru la ĉefajn problemojn, kiujn frontas la homaro, kaj montru en ĉiu kazo la bezonon de internacia kunlaboro kaj ĝian praktikan formon;
 - (e) oni pretigu kaj komuniku al aliaj landoj dokumentojn kaj aliajn materialojn, kiuj ilustru la kulturon kaj vivmanieron de ĉiu lando, la ĉefajn problemojn, kiujn ĝi frontas, kaj ĝian partoprenon en agado de tutmonda intereso.
39. La Ŝtatoj-Membroj instigu taŭgajn paŝojn por certigi, ke edukiloj, precipe lernolibroj, ne enhavu elementojn, kiuj eventuale povus krei miskomprenadon, malfidon, rasistajn reagojn, malestimon aŭ malamon kontraŭ aliaj grupoj aŭ popoloj. Tiuj materialoj donu larĝan fonon de scioj, kiuj helpas lernantojn distingi tiujn informojn kaj ideojn disvastigitajn de la amasmedioj, kiuj ŝajnas kontraŭi la celojn de tiu ĉi rekomendo.
40. Laŭ ties bezonoj kaj ebloj, ĉiu Ŝtato-Membro fondu aŭ helpu fondi unu aŭ kelkajn dokumentajn centrojn, kiuj proponu skriban kaj aŭdvidan materialon elpensitan konforme al la celoj de tiu ĉi rekomendo kaj adaptitan al la diversaj formoj kaj stadioj de edukado. Tiuj centroj estu tiel kreitaj, ke ili akcelu la reformon de internacia edukado, precipe per evoluigo kaj disvastigo de novigaj ideoj kaj materialoj; kaj la centroj ankaŭ organizu kaj faciligu interŝanĝon de informoj kun aliaj landoj.

IX. Esplorado kaj eksperimentado

41. La Ŝtatoj-Membroj stimulu kaj apogu esploradon pri la fundamentoj, gvidaj principoj, plenumrimedoj kaj efikoj de internacia edukado kaj pri novenkondukaĵoj kaj eksperimentaĵoj ĉi-kampe, kiel ekzemple tiuj, kiuj okazas en la Asociiĝintaj Lernejoj. Tiu agado postulas kunlaboron de universitatoj, esploraj instancoj kaj centroj, instruistaj seminarioj, trejnaj centroj por plenaĝula edukado kaj kompetentaj neregistaraj organizoj.
42. La Ŝtatoj-Membroj faru taŭgajn paŝojn por certigi, ke instruistoj kaj la diversaj koncernaj instancoj konstruu internacian edukadon sur firma psikologia kaj sociologia bazo, aplikante esplorrezultojn atingitajn en ĉiu lando pri la formado kaj evoluigo de favoraj aŭ nefavoraj sinteno kaj konduto, pri sintena ŝanĝiĝo, pri interago de personec-evoluoj kaj edukado, kaj pri la pozitivaj kaj negativaj efikoj de eduka agado. Oni dediĉu signifan parton de tiu esplorado al la aspiroj de gejunuloj koncerne internaciajn problemojn kaj rilatojn.

X. Internacia kunlaboro

43. La Ŝtatoj-Membroj konsideru internacian kunlaboron kiel respondecon en la evoluigo de internacia edukado. Plenumante tiun ĉi rekomendon, ili detenu sin de interveno en aferoj, kiuj esence apartenas al la interna jurisdikcio de iu ajn Ŝtato laŭ la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Per la propraj agoj, ili montru, ke plenumado de tiu rekomendo konsistigas en si mem klopodon por internaciaj kompreniĝo kaj kunlaboro. Ili ekzemple organizu, aŭ helpu la kompetentajn instancojn kaj neregistarajn organizojn organizi, kreskantan nombron da internaciaj kunvenoj kaj studsesioj pri internacia edukado; plifortigu siajn programojn por akcepti eksterlandajn studentojn, esploristojn, instruistojn kaj edukistojn membriĝintajn en laboristaj asocioj kaj asocioj pri plenaĝula edukado; akcelu reciprokajn vizitojn de lernejoj, kaj studentajn kaj instruistajn interŝanĝojn; vastigu kaj intensigu interŝanĝojn de informoj pri kulturoj kaj vivmanieroj; aranĝu pri traduko aŭ adaptado kaj disvastigo de informoj kaj sugestoj, kiuj fontas el aliaj landoj.
44. Helpe de Unesko, la Ŝtatoj-Membroj stimulu kunlaboron inter la propraj Asociiĝintaj Lernejoj kaj la eksterlandaj, por akiri komunajn avantaĝojn per vastigo de la spertoj en pli larĝa internacia perspektivo.

45. La Ŝtatoj-Membroj stimulu pli vastan interŝanĝadon de lernolibroj, precipe historiaj kaj geografiaj, kaj en konvenaj kazoj entreprenu paŝojn, laŭeble per akcepto de duflankaj aŭ multflankaj interkonsentoj, por reciprokaj studado kaj reviziado de lernolibroj kaj aliaj edukaj materialoj. Tio celu certigi, ke ili estas ĝustaj, ekvilibraj, ĝisdataj kaj sen antaŭjuĝoj, kaj ke ili plibonigos reciprokajn sciojn kaj kompreniĝon inter la diversaj popoloj.

Unesko, Parizo, 1977

Eldonis en Esperanto en 1977 la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo, Place de Fontenoy, F-75700 Paris, Francio, laŭ kontrakto kun Universala Esperanto-Asocio.

Ĝisdatigo de Drezen

Recenzas Bernard Golden (Hungario):

Bábelról a Világnyelvig (De Babelo al la mondlingvo) de István Szerdahelyi. Budapest: Gondolat, 1977, 415p. Ilus. 20cm. Eldonkvanto: 5000 ekz. Prezo: 45,— forintoj. En la hungara lingvo.

Dum la lasta jardeko estis eldonitaj en diversaj naciaj lingvoj kelkaj signifoplenaj verkoj temantaj pri la interlingvistiko kaj pri Esperanto enkadre de tiu ĉi sciencobranĉo.* Tiel, legantoj de la angla, franca, germana, itala, portugala kaj rusa lingvoj povas informiĝi pri la multfacetaj aspektoj de la monda lingvo-problemo kaj ekscii, kiel lingvoplanantoj provis krei internaciajn aŭ universalajn lingvojn. Per la eldono de la nun recenzata verko, la historio de la planlingvistiko fariĝas alirebla por hungarlingvanoj.

Estas iom malfacile precize enfakigi *Bábelról a Világnyelvig*. Ĉu ĝi estas destinita al laikoj aŭ al fakuloj? Ĉu ĝi estas libro por legi aŭ por konsulti? Komparante ĝin kun samtemaj verkoj, oni povas karakterizi ĝin kiel ĝisdatigitan version de *Historio de la mondlingvo* de Ernest Drezen, kiu aperis antaŭ pli ol 40 jaroj. Ambaŭ libroj traktas la materialon pli-malpli sammaniere.

Kiel la titolo indikas, la verko ampleksas la historion de la provoj forigi la malbenon de Babelo. Post mallonga enkonduko pritraktanta la sociajn, psikologiajn, politikajn kaj ekonomiajn aspektojn de la mondlingva problemo, sekvas ĉapitroj pri la mondlingvoj de la antikveco, internaciaj trafik-lingvoj (piĝinoj, kreolaj lingvoj, koineoj), diplomaciaj lingvoj, fikciaj kaj filozofiaj lingvoj, gestaj lingvoj, piktogramaj lingvoj, pazigrafioj, logikaj lingvoj kaj fine la mult-nombraj jam publikigitaj planlingvaj projektoj. Aparta ĉapitro estas dediĉita al kontribuadoj de hungaroj al la planlingvistiko. Ĉe la fino de la libro troviĝas 56

* Alessandro Bausani: *Le Lingue Inventate*, 1974 (itala traduko de la germana originalo *Geheim- und Universal-sprachen*, 1970).

Pierre Burney: *Le Lingue Internazionali*, 1969 (itala traduko de la franca originalo *Les Langues Internationales*, 1962).

Reinhard Haupenthal (redaktoro): *Plansprachen: Beiträge zur Interlinguistik*, 1976 (germana).

M.I. Isaev (redaktoro): *Problem'i Interlingvistiki*, 1976 (rusa).

Pierre Janton, *L'Espéranto*, 1973 (franca).

James Knowlson: *Universal Language Schemes in England and France 1600-1800*, 1975 (angla).

Paulo Rónai: *Der Kampf gegen Babel*, 1969 (germana traduko de la portugala originalo *Homens Contra Babel*).

paĝoj kun notoj kaj bibliografiaj informoj kaj 14-paĝa indekso de lingvonomoj kaj aŭtoroj.

La pritrakto de la diversaj planlingvaj projektoj estas malegala. La "grandaj" lingvoj, kiuj havis movadon kaj produktis literaturon (Volapuko, Esperanto, Ido, Occidental kaj Interlingua) estas adekvate priskribitaj, tiel ke estas eble kompari ilin strukture kaj leksike. La plejmulto de aliaj projektoj restas nur nomoj kun kelklinia komento. Tio estas bedaŭrinda, ĉar la originalaj eldonaĵoj estas nun tre malfacile haveblaj, kaj bonaj priskribaj resumoj, kune kun vortlistoj kaj tekstoj laŭ la traktado en la verkoj de Couturat kaj Leau (*L'histoire de la langue universelle*: 1903 kaj *Les nouvelles langues internationales*: 1907) estus provizintaj interlingvistojn per valora materialo. Anstataŭ kompletaj priskriboj, troviĝas pluraj paĝoj konsistantaj el reproduktadoj de titol- kaj tekst-paĝoj el libroj pri diversaj projektoj. Miaopinie, tio estas malŝparo de spaco kaj ne kontentigas la deziron de la leganto scii pli pri la lingvo mem. Ekzemple, kontraŭ 6 faksimilaj paĝoj pri la ideografio de Sinibaldo de Mas estas nur 4 linioj da teksta klarigo. Kaj Stipfone kun 5 reproduktitaj paĝoj ricevas klarigon de nur du linioj! La bibliografio estus povinta fariĝi la plej valora parto de la verko, kiel daŭrigo kaj ĝisdatigo de *Bibliografio de internacia lingvo* (1929) de P. Stojan, sed ĝi estas aranĝita en tre malfacile uzebla formo, nek laŭ alfabeto ordo de aŭtor-nomoj, nek laŭ temoj.

Krom la supra traktado de pluraj gravaj lingvo-projektoj, mankas en *Bábelról a Világnyelvig* indikoj pri aliaj planlingvoj jam menciitaj en antaŭe publikigitaj verkoj aŭ aperintaj dum la lastaj jaroj. Tiurilate ĝi estas malpli kompleta ol la libro de Drezen.

Fine, kelkaj preseraroj rilate nomojn, datojn kaj volum- kaj paĝ-numerojn povas misgvidi legantojn.

Franca renesanco antologie

Recenzas James F. Cool (Usono):

Renesanca periodo, La. Enkondukoj, notoj kaj tradukoj el la franca de Gaston Waringhien. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1977. 207p. 20cm. Dulingva (franca kaj Esperanta)

William Auld lastatempe pledis por la starigo de seriozaj studprogramoj pri kompara literaturo, baze de Esperantaj tradukoj. Kvazaŭ ĉi-subtene venas ampleksa antologio de la franca renesanco (deksesajarcenta) poezio. Waringhien estas des pli laŭdinda, ke li presigis vid-al-vide de siaj tradukoj la arkaik-francajn originalojn, kune kun lingvaj kaj kulturaj notoj por faciligi ties komprenon.

Sed tute ne temas pri iu pedanta akademiano. En siaj brile intereskaptaj enkondukoj, Waringhien prezentas la ravajn kontrastojn de ĉi tiu periodo, kies mizeraj vivkondiĉoj sammulte distancas de nia tempo, kiom

la renesancaj aspiroj je beleco, harmonio kaj klereco foras al ni; tiam poetoj principiĝis, dum princoj poetiĝis, kaj laikoj prikantis spiritan, "platonan" amon samfervore kiel ekleziestroj la korpan.

Ankoraŭ en nia jarcento povas ĉarmi kaj ofte profunde efiki ĉi tiuj "poemetoj de intima agordo", kies ĉefajn temojn — la ĝuojn de ĉi-suba mondo kaj la bedaŭrojn pri ilia forpaso — la poetoj interplektade variigas. Prave Waringhien reliefigas du ĉefpoetojn, la dolĉe melankolian kaj seniluziigintan Belajon (Du Bellay) kaj la pli virecan, tamen ŝanĝiĝeman Ronsardon, kies poemoj prilumas pleje liajn variegeajn animstatojn sed ankaŭ sociajn kaj politikajn renversojn. Waringhien celas personan sed plene reprezentan elekton, kiu ampleksu pli multe ol nur la lernej-konsekritajn antologiaĵojn (feliĉe ankaŭ ĉi tiuj troviĝas). Tial li enkadrigas verkojn de la du ĉefuloj per poemoj de la valezaj gereĝoj kaj de duarangaj poetoj. Dankeme oni akceptas la lukson de kvar reesperantigitaj sonetoj de Luiza Labé (la sama eldonejo jam publikigis Esperante ŝian poemaron). Oni povas bedaŭri nur la foreston de ajna dekverso de Maurice Scève, la plej elstara inter la lionaj poetoj.

La tradukoj mem rivalas inter si kaj inde respegulas, per siaj eltrovemo kaj gracio, la originalojn. Ekzemple, Waringhien tradukas "Les Regrets", titolon de poemaro de Belajo, per "La Sopiroy". Tiaj neatenditaj, sed frappe ĝustaj, tradukaĵoj karakterizas la tutan kolekton. Foje la konkretaĵoj de la originalo iom perdiĝas; kaj se Waringhien ne hezitas alietigi iun rimskemon, rekompence li ĉiam konservas la enhavon kaj tonon. Precipe taŭge li esperantigas la originalan francan metrikon.

Prezo: 21,00 (por Nederlando 21,84) gld., plus sendokostoj 10%.

Reciproka riĉiĝo

Recenzas Probal Daŝgupto (Hinda Unio):

Kantoj poemoj kaj satiroj, de Robert Burns (1759-1796). El la skota trad. Reto Rossetti (1909-) kaj William Auld (1924-). Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1977. Esperantaj kajeroj, n-ro 3. 80p. 21cm. ISBN 0 9505323 1 2.

23 kantoj, 13 poemoj kaj 7 satiroj de la korifeo de la moderna skota poezio nun estas internacie alireblaj, en inĝenia versio de Auld (11 kantoj) kaj Rossetti (cetere). Komentisto komparis la rolon de Burns en la brita Kleriĝo al tiu de la filozofo Hume kaj la ekonomikisto Adam Smith. La grava atingo de Burns, dumviva gajulo, estis genie rekonigi, ke ridi kaj vivĝoji ne estas krime. Lia kulturo memoras kun celebros la aŭdacan senĝenon de tiu lia demonstro.

La juste famaj tradukintoj faris novajn ĉizojn, ĵonglojn, grandiozojn. Senmortecon meritas la verso-seso ekde *Sed ĝojo al papav' egalas* (45). Pli specife lingvoriĉigas: *hirtaj lancoj* (30), *rivero baŭmas* (47),

grizharoj kaĉis sur la klingo (48), *sur la mond' migrul' ĉiama* (55).

Ankaŭ Robertson Burns riĉigas tradukantojn, kiuj pruntedonas al li modernajn **elano** (11) kaj **malveo** (13) kun ties apartaj nuancoj, aŭ kiuj igas lin diri *la bal' atingis apogeon* (48) kaj *Fi al la kampanjo, per kiu la panjo...* (25). Ĉikanemistoj krii 'anakronismo!'; mi salutas la modernan serenon, per kiu Rossetti konfesas (71) anstataŭigi per 'ŝamano' (28) la burns-an moknomon por la diablo 'Mahomeĉjo', kiu 'evidente ofendus' al islamanoj. Oni ja traduku, ne glosu.

Prezo: 6,30 (por Nederlando 6,55) gld., plus sendokostoj 10%.

Novaj libroj de DEF



FIANĈO DE L'SORTO, originala romano de J.H. Rosbach, 192p. 45,00 dkr. Laŭ opinio de W. Auld, la verko estas arta triumfo.

GUDRUN, romano de konata dana verkisto, Joh. V. Jensen, tradukita, 134p. 25,00 dkr. Kun ĝuo vi legos ĝin.

LA URBO DE TERURA NOKTO, la ĉefverko de la skota verkisto James Thomson, 45-paĝa eposo. Majstre ĝin tradukis W. Auld. 17 jarojn li bezonis. Ĝi kostas 10,00 dkr.

Petu nian detalan katalogon. Ĉiuj niaj verkoj estas haveblaj ĉe UEA, ĉe ĉiuj landaj revendistoj kaj rekte ĉe la eldonejo

DANSK ESPERANTO-FORLAG
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Aabyhøj, Danlando.



Bábelből a világnyelvig, István Szerdahelyi. Budapest: Gondolat, 1977. 415p. 20cm. Bind. ISBN 963 280 180 6. Hungarlingva verko pri la lingva problemo, interlingvistiko kaj Esperanto. Kun ampleksa bibliografio.

Białystok. Grafikajoj de Henryk Wilk. Warszawa: Wydział Kultury Prezydium Miejskiej Rady Narodowej w Białymstoku, 1972. 157p. Ilus. 29cm. En lingvoj pola, rusa, angla kaj Esperanta. Prezo: 19,40 gld.

Esperanto; Rivoluzione della parola, Vittorio dall'Acqua. Milano: Istituto Editoriale Universitario, 1977. 167p. 20cm. Detala lernolibro, kiu inkluzivas faksimilon de preskaŭ la tuta Fundamenta Ekzercaro. Prezo: 10,50 gld.

Ingenia hidalgo Miguel Cervantes; La, Han Riner (ps. de Henri Ner, 1861-1938). El la franca trad. R. Laval (1900-). Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1978 (fakte 1977). 134p. Mimeo. 21cm. Biografia romano pri la aŭtoro de *Don Quijote*. Prezo: 4,50 gld.

Islanda lingvo; Enkonduko en la gramatikon, Árni Bödvarsson. Reykjavík: 62a Universala Kongreso de Esperanto kaj Islanda Esperanto-Asocio, 1977. 20p. 21cm. Koncizaj notoj pri la elparolo kaj gramatiko de la islanda, kun laŭkategorio provizo de utilaj esprimoj. Prezo: 2,70 gld.

Koloraj nuboj, Haŭ Ĵan. El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 149p. Ilustris Dong Ĉenŝeng kaj Ĉen Juhia. 18cm. 10-Es-1317P. Ok ĉinaj noveloj el la periodo 1957-1964. Prezo: 2,40 gld.

Kvin herooj sur Langja-monto. Kompilis kaj pentris Loŭ Kiguĵ. El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 40p. (ne-numeritaj). Kolorilus. 17cm. 88-Es-134P. Bildrakonto pri atako en 1941 de ĉinaj ruĝarmeanoj kontraŭ japanaj invadintoj. Prezo: 0,90 gld.

Lernolibro de Esperanto por la unua lernojaro, Jordan Markov, Kunĉo Válev kaj Ivan Sarafov. Sofia: Narodna Prosveta (Ŝtata Eldonejo), 1976. 192p. Ilus. 21cm. Prezo: 6,60 gld.

Liberpoeto, La (1938), Dan Tirinaro (ps. de Sasop Ĝong). Suda Koreo, 1975 (fotorepreso). 160p. Ilustris Solemio Palermo. 17cm. Originalaj versaĵoj de korea poeto. Prezo: 9,00 gld. 9,00 gld.

Linguistique et non-violence, H. Masson (1943-). Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1978 (fakte 1977). 11p. Mimeo. 21cm. Argumento por Esperanto kiel rimedo de lingva neperforto. Prezo: 0,60 gld.

Migrantoj en Francio nuntempe, La, F. de Cazenove. El la franca tradukis Valo. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1978. 44p. Mimeo. 21cm. Prezo: 1,80 gld.

Nekonata konato, La (1932), Douglas P. Boatman (1892-). Kopenhago: TK, 1977 (2a eld., fotoreprese). 122p. 20cm. ISBN 87 87089 13 0. Originala romano pri vidvo, kies reedziĝon mistere malhelpas la enrudigo de "nekonata konato." Prezo: 6,60 gld.

Plena ilustrita vortaro de Esperanto (1970), ĉefredaktis G. Waringhien (1901-). Paris: SAT, 1977 (2a eld.). 37+1303p. Ilus. de E. Stöp-Bowitz. 20cm. Bind. Aŭtoritata, la plej ampleksa vortaro de la Internacia Lingvo; tridek paĝoj da ilustraĵoj. Kvarpaĝa erartabelo korektas malglatecojn de la unua eldono. Enhavas multajn sciencajn kaj teknikajn terminojn. Prezo: 108,78 gld.

Por nia medito, H. Ryner kaj Alain. El la franca tradukis E. Lanti. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1978. 31p. Mimeo. 21cm. Prezo: 0,90 gld.

Pri dek gravaj interrilatoj (1956), Maŭ Zedong (1893-1976). El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 31p. 18cm. 1-Es-966P. Prezo: 0,60 gld.

Ribela saĝo, Multatuli (ps. de Eduard Douwes Dekker, 1820-1887). El la nederlanda tradukis Wouter Pilger. Lelystad: Vulpo-Libro, 1977. 36p. 21cm. ISBN 90 70074 08 7. Elektitaj paraboloj, rakontoj kaj aforismoj socikritikaj. Prezo: 4,20 gld.

Sankta Francisko; Poeziaĵoj, Sergiusz Riabinin (1918-). El la pola tradukis Szymon Weyland. Romo: IKUE-Centro, 1977. 148p. Ilustris Zbigniew Jóźwik. 21cm. IKUE 5. "Notaĵoj" verkitaĵoj okaze de la 750-jara datreveno de la granda kristana mistikulo kaj naturamiko. Prezo: 13,80 gld.

Soci-psikologio kaj grupo-dinamiko de la Esperanto-movado, Tazio Carlevaro (1945-). La Chaux-de-Fonds: Kultura Centro Esperantista, 1977. 36p. Mimeo. 30cm. Kun sociologia-psikologia terminareto. Prezo: 6,00 gld.

Spirita trezoro de la fidanto, La, Stephan Pretorius. Selano, 1977. 32p. 21cm. Kristana. Prezo: 3,00 gld.

Teorio de Esperanto; Helpilo por superaj Esperanto-kursoj (1929), V. Varankin (1902-1937). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1977 (fotorepreso). 70p. 21cm. Prezo: 10,20 gld.

Tiele parolis Zaratuŝtra; Libro por ĉiu kaj neniu (1883), Friedrich Nietzsche (1844-1900). Enkonduko kaj notoj de Walther Linden. El la germana tradukis W.A. Verloren van Themaat. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1977. 366p. 21cm. ISBN 951-9005-40-4. Kvazaŭ prozpoema ciklo legiĝas ĉi tiu kerna verko de la moderna filozofio. Prezo: 25,20 gld.

Tonio Kröger (1903), Thomas Mann (1875-1955). El la germana tradukis Šiger Ujeki. Tokio: Zamenhof-Klubo, 1977. 89 + 4p. 18cm. Longa novelo pri la problemo de la arto kaj la vivo, verkita en lirika stilo nekutima ĉe la nobelpremiita aŭtoro. Prezo: 12,30 gld.



Trofeoj, La; La Sonetaro (1893), José Maria de Heredia (1842-1905). El la franca tradukis Gaston Waringhien. Kopenhago: TK/Stafeto, 1977. 220p. 21cm. Bel-literatura eldon-serio 36. ISBN 87 87089 08 4. Ĉefverko de la franca parnasismo. Prinotita de la tradukinto. Prezo: 12,00 gld.

Steiner: Vivo kaj konceptoj de Rudolf Steiner, Jo Haazen. Antwerpen, 1977. 18p. Mimeo. 27cm. Teksto de prelego pri la aŭstra filozofo (1861-1925), kun mallonga bibliografio. Prezo: 4,20 gld.

Vizito al lernejo, Guan Hua. El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 61p. Ilustris Ŝen Ĵaŭji. 18cm. Prezo: 0,90 gld.

Vortoj de Romain Rolland kaj Esperantaj vortoj koncernantaj la apostolon. Aranĝis Hukuta-Masao kaj membroj de Hino-Esperanto-Klubo. Tokio: Asaka-Shoboo, 1977. 82p. Ilus. 20cm. Parte japanlingva kompilaĵo de vortoj de Rolland (1866-1944) pri Esperanto, kaj vortoj de diversaj esperantistoj (ekz. Lanti kaj Privat) pri la nobelpremiita aŭtoro de *Jean-Christophe*. Prezo: 3,60 gld.

Vorto kaj vortelemento en Esperanto, István Szerdahelyi. Kuopio: Literatura Foiro / KCE, 1976. 16p. 21cm. Studoj 10. Provo revizii la tradiciigintan teorion pri la gramatika karaktero de la Esperantaj radikoj. Prezo: 3,30 gld.

Zamenhof: Vivo de Zamenhof (1920), Edmond Privat (1889-1962). Orelia: The Esperanto Publishing Company, 1977 (reprezo de la 5a eld., 1967). 133p. Ilus. 18cm. Bindita. ISBN 0 85230 201 0. Klasika biografio de Zamenhof, kun priskribo de ties filozofiaj, lingvaj kaj movadaj ideoj kaj agadoj. Prezo: 15,00 gld.

DIVERSAĴOJ:

Konteltiro. 21,5 x 27cm. Duflanka formularo (kun loko por entute 66 enskriboj). Rotterdam: Mondkomerca Eldonejo Esperantista, 1977. Prezo: 10 folioj por 3,50 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.

Bonan vojaĝon!

Tio ĉi, kompreneble, estas nur malpli granda parto de la movadaj aranĝoj en la sekva duonjaro. Nian kalendaron ne eniris tuta aro da semajnfinoj kulturaj kaj aliaj, kiuj, kvankam anoncataj kiel internaciaj, estas tio nur en Eŭropo, kie landlimoj abundas kaj facile transireblas, aŭ devus facile transiriĝi. Ni planas aperigi pli kompletan kalendaron en nia marta numero. Viaj atentigoj pri aranĝoj estas bonvenaj ĝis la fino de januaro 1978. Pensu tamen pri niaj kriterioj. Nun elektu la aranĝon al kiu vi iros antaŭ la fino de majo.

Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 11 10a datreveno de Aŭstria E-Movado, Ternitz, Aŭstrio (AEM, Hofburg 156, Wien A-1014)
- 15 Tago de la Esperanta Libro
- 15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
- 26-78 01 05 21a Esperantista Skiferio, Adelboden, Svislando (KCE, Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-Fonds)
- 27-78 01 03 21a Internacia Seminario de GEJ, Rotenburg, FR Germanio (Guido Brandenburg, Brinker Damm 24, D-4404 Telgte)
- 28-78 01 02 7a Vintra E-Feriado, Budapeŝto, Hungario (TK de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapeŝto)
- 29-78 01 03 Internacia Junulara Renkontiĝo, Pula, Jugoslavio, (KEJA, Amruŝeva 5/I, YU-41000 Zagreb)
- 31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas

Januaro

- 02-08 21a Aŭstralia E-Kongreso, Launceston, Tasmanio, Aŭstralio (Mac LeFevre, 22 Belle Vue Ave., Launceston 7250)
- 17-21 43a Kongreso de Nov-Zelanda E-Asocio, Universitato Massey, Nov-Zelando (Mary Richardson, 78 Thackeray St., Upper Hutt)

Februaro

- 03-07 Internacia seminario por junularaj aktivuloj, Oberwesel, FR Germanio (Esperanto, Karl-Strauss-Str. 1, D-8700 Würzburg)
- 11-18 19a Internacia Fervojista E-Skisemajno, Grainau, FR Germanio (Josef Weidacher, Schneefinkenweg 11, D-8000 München 82)
- 19-25 Semajno de Internacia Amikeco

Marto

- 11-12 Internacia Foira E-Renkontiĝo 1978, Leipzig, GDR (Kulturbund der DDR, Leipziger Arbeitskreis Esperanto, IFER '78, Käthe-Kollwitz-Str. 115, DDR-701 Leipzig)

- 23-27 2a Junulara Internacia Festivalo, Jezolo (Venecio), Italio (Itala Esperantista Junularo, Poŝtfako 210, I-56100 Pisa)
- 24-27 62a Brita Kongreso de Esperanto, Morecambe, Britio (Edna Lamb, 14 Arnside Crescent, Morecambe, Lancs.)
- 24-27 Junulara Paska Renkontiĝo, Epe, Nederlando (NEJ, Coranthijnestr. 75, Groningen 8003)
- 31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas
- 31 Limdato de la Belartaj Konkursoj

Aprilo

- 14 Zamenhof mortis en 1917
- 22-23 Jara kongreso de Sveda Esperanto-Federacio, Uppsala (SEF, Fack, S-122 04 Stockholm-Enskede)
- 28 UEA fondiĝis en 1908
- 29-05 01 14a Markola Kongreso 78, Folkestone, Anglio (A. Marmenout, Helmweg 7, B-8300 Knokke-Heist 1, Belgio)
- 30 Limdato por la Internacia Ekzameno

Majo


- 12-16 70a Franca Nacia Kongreso de Esperanto, Clermont-Ferrand (UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)
- 12-16 56a Germana E-Kongreso, Augsburg (H. Schmid, Alte Reichsstr. 31f, D-8901 Steppach-Augsburg)
- 12-16 Internacia junulara renkontiĝo, Augsburg, FR Germanio (Esperanto, Karl-Strauss-Str. 1, D-8700 Würzburg)
- 13 Konkursc de la E-kanzono, Clermont-Ferrand, Francio (J.P. Boulet, 7 avenue du Forez, F-63800 Cournon D'Auvergne)
- 13-20 30a IFEF-Kongreso, Roma, Italio (Kongreso de IFEF, Dopolavoro Ferroviario di Roma, Via Bari 22, I-00161 Roma)
- 26-28 73a Kongreso de la Skota Federacio, Alloa, Skotlando (A. Goodheir, 16 Woodlands Drive, Coatbridge, ML5 1LE, Britio)



Io simila atendas vin en Adelboden dum la jarŝanĝaj tagoj.

Britio

- En Hengrave Hall, Edmunds, Suffolk, inter la 11a kaj 13a de novembro ĉi-jare, okazis seminaria kurso por esperantistoj, kiuj volis informiĝi pri la baza arto instrui la Internacian Lingvon. Tio tamen estis nur



unu el ses kursoj, kiuj en tiu semajnfino okazis samloke. Krom trigradaj lingvokursoj, funkciis ankaŭ aparta seminario pri informado. La kursojn gvidis: John Brownlee, Raif Markarian, Brian Bishop, Alec Venture, Ian Fantom kaj Tony Cartwright, unu el la direktoroj de la Brita Seminario por Instruistoj. Aliĝis entute 65 partoprenintoj, kiuj aŭskultis ankaŭ primovadajn prelegojn, ĝuis artan programon kaj — pozis por la supra foto de Nigel Rees. La organizinto de la aranĝo estis John Brownlee.

Salvadoro

- La eltrovemo de d-ro Corsetti, UEA-komisiito pri regiona agado, minacas enskribi novan landon en la movadan mondmapon. En Salvadoro, Centra Ameriko, agadas tre kompetenta esperantisto, s-ro Francisco E. Lopez (Box 86, San Miguel, El Salvador), kiu bonvenigus sendaĵojn kun lerniloj kaj informiloj.

Nederlando

- La 6an de novembro ĉi-jare, s-ro J. Tensen, pensiita instruisto kaj fakdelegito de UEA en Amsterdamo, gastis en la populara programero de la nederlanda televido "Sprekers-

hoek" (Angulo de la parolanto) kaj pledis por Esperanto, dum deko da minutoj. Tuta lavango de pli ol 400 leteroj kaj telefonvokoj kun informpetoj sekvis la elsendon. S-ro Tensen mobilizis plurajn helpantojn, havigis disponeblajn informilojn, verkis longan leteron kaj dissendis al la adresoj de ĉiuj interesitoj. Ĉi tiu sukcesa propaganda paŝo povus montriĝi tre grava por la letargia kaj organize diserigita Movado en Nederlando.

Hinda Unio

- S-ro M.A. Vyas (17/6 Choti Gwaltoli 2, Indore M.P., 452-001 Hinda Unio), prezidanto de la tiea Esperanto-klubo, fine de septembro faris kvaronhoran paroladon pri Esperanto en la loka radio-stacio. S-ro Vyas ankaŭ instruas Esperanton en la lernejo kie li laboras.

Francio

- La 28an de oktobro, jam por la tria fojo, Unuiĝo Franca por Esperanto prezentis la Internacian Lingvon en la programo "Libera tribuno" de la Franca Televido. En la elsendo, kiun preparis s-roj R. Despiney kaj J.A. Rousseau, oni prezentis aktualajn movadaĵojn: s-ro E. Chicot parolis pri la 62a UK kaj aŭdigis fragmenton el la franclingva parolado de la ĝenerala direktoro de Unesko en Rejkjaviko; s-ro J.P. Danvy parolis pri la 33a IJK en Poitiers; f-ino M. T. Liouville prezentis la pedagogiajn aspektojn de la lernado de Esperanto. La programo inkluzivis ankaŭ kantojn de J. LePuil kaj aliajn erojn.



Informado

- Laŭ la iniciato de Pola Esperanto-Asocio, en Varsovio antaŭ kelka tempo aperis la pollingva broŝuro *Ruch esperancki na świecie* (La Esperanto-movado en la mondo). La broŝuro, kies aŭtoro estas A. Pettyn, enhavas bazan informan materialon pri Esperanto, kun aparta konsidero de la praktika utiligo de la lingvo kaj la agado de UEA. Baldaŭ devus aperi ankaŭ la dua parto de la broŝuro, kiu traktos la Movadon en Pollando. La celo de la nova eldonaĵo estas havigi bazan informmaterialon por prelegantoj

kaj ĵurnalistoj. La broŝuron oni jam sendis al ĉ. 250 gazetoj kaj revuoj.

Filatelo

- Meze de oktobro ĉi-jare, ĉeĥoslovakaj esperantistoj-filatelistoj aldonis al sia riĉa kolekto de medaloj



ankaŭ tiujn ricevitaĵojn en la granda tutlanda filatela ekspozicio "Tema-fila 77", okazinta en Sezimovo inter la 8a kaj 16a de oktobro. Tie s-ro Vlāda Vāna gajnis grandan oran medalon kaj honorpremion por sia kolekto "Ĉapitroj el la historio de Esperanto". Aliajn medalojn gajnis la kolektoj pri Esperanto de s-roj D. Bartošík, V. Hasala kaj A. Jakubec. Aparte oni premiis la redaktoron (V. Hasala) de la *Informilo*, organo de la Esperanto-sekcio de la ĉeĥoslovaka filatela organizaĵo.

Persone

Jung

- Akademiano Teo Jung, honora membro de UEA kaj dojeno de la Esperanta ĵurnalismo, festos la 21an de decembro 1977 sian 85an datrevenon. La fondinto kaj multjara redaktoro de *Heroldo de Esperanto* antaŭ nelonge finverkis dikan volumon de siaj movadaj memoraĵoj kaj nun traktas ĝian publikigon ĉe la Eldonejo TK. Kiam s-ro Jung serĉis titolon por sia nova verko, ni ŝerce proponis, ke ĝi nomiĝu "Libro de Teo", pri kio li bele ridis, sed tamen malakceptis la proponon.

Llech-Walter

- La prezidanto de la franca Senato, s-ro Alain Poher, kiu samtempe estas prezidanto de la Nacia Societo "Kuraĝigo al Bonfaro", antaŭ nelonge decidis distingi s-ran René Llech-Walter per ora medalo de la Societo. La distingo ligiĝis ĉefe al la pli ol duonjarcenta Esperanto-agado de s-ro Llech-Walter, kiu estas honora prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto.

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 14

(pri la demando vidu nian novembran numeron, p. 199)

1. D-ro JOHN POLLEN (1848-1923) estis irlanda advokato kaj leŭtenanto-kolonelo, kiu loĝis en Britujo. Li pasigis la jarojn 1871-1903 en Hindujo. Li estis la prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio de 1904-1912. En 1905 li fariĝis ano de la Lingva Komitato. Li invitis la 3an Universalan Kongreson al Kembriĝo, Anglujo, kaj estis unu el la "Trio por la Tria", la komisiono, kiu organizis la Kongreson. Li verkis Esperanto-ŝlosilon por hindoj.

2. CHARLES LEMAIRE (1863-1926) estis oficiro (majoro aŭ komandanto) en Belgujo kaj esploris en la Belga Kongo en Afriko. Poste li fariĝis direktoro de Kolonia Universitato en Antverpeno. Zamenhof nomis lin "la vera patro de la belgaj esperantistoj". Li estis la unua prezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista, fondita en 1905. En la sama jaro li eniris la Lingvan Komitaton. En 1902 li fondis per sia propra mono la revuon *La belga sonorilo*. En 1906 estis eldonita lia ilustrita geografia verko *Tra Mez-Afriko*. Kune kun d-ro Javal, li proponis al d-ro Zamenhof 250 000 francajn frankojn por enkonduki reformojn en Esperanton. Zamenhof rifuzis, do Lemaire unue kreis sian propran lingvan projekton, *Ilo-n*, kaj poste, en 1908, fariĝis adepto de Ido.

3. VICENTE INGLADA-ORS (1879-1949) estis profesoro pri astronomio kaj meteorologio en la supera staba lernejo en Hispanujo, kie li havis la armean rangon de vickolonelo. Li esperantistiĝis en 1899 kaj fariĝis ano de la Lingva Komitato en 1905. Li dediĉis sin al la verkado de originalaj poemoj kaj teatraĵoj, kiuj estis premiitaj en literaturaj konkursoj de *La revuo*. Sed lia ĉefa kontribuo al la Esperanto-kulturo estis la tradukado de beletraĵoj de la hispana lingvo, precipe teatraĵoj. Li fondis kaj ĉefredaktis la unuan hispanan Esperanto-

gazeton, *La suno hispana*. Li ankaŭ gvidis kursojn kaj verkis lernolibrojn kaj vortarojn.

4. FEODOR ALEKSEJEVIĈ POSTNIKOV (1872-1952) estis leŭtenanto en la kozaka armeo de la cara Rusujo, poste kapitano de inĝeniera korpuso en Vladivostoko kaj fine kolonelo de aernavigantoj dum la Rusa-japana milito. Li forlasis Rusujon post la revolucio de 1905 kaj enmigris Usonon en 1906. Dum la 1-a mondmilito li fariĝis kapitano en la usona armeo, kaj en la usona Esperanto-movado li estis konata kiel "Kapitano Post". Li esperantistiĝis en 1891 kaj fariĝis la tria prezidanto (1897-1899) de la unua oficiala Esperanto-societo fondita en Rusujo en 1892, la grupo Espero en Petrogrado. Inter 1902 kaj 1905 li estis prezidanto de la vladivostoka grupo. En 1902 li enkondukis Espe-



Majoro kaj kolonelo: Charles Lemaire (1863-1926) kaj John Pollen (1848-1923).

ranton en Japanujon. Poste li organizis la unuan Esperanto-rondon en Kalifornio, Usono. Liaj originalaj kaj tradukitaj beletraĵoj aperis en *Lingvo Internacia* kaj *L'Espérantiste* kaj ankaŭ en la volumo *Esperantaj prozaĵoj*. Li eldonis kaj redaktis la revuon *Pacifika espero* dum 1913-1916 kaj 1926-1928.

5. JEAN RIBILLARD (1904-1962) el Francujo servis kiel majoro en la franca afrika armeo en Maroko. Li esperantistiĝis en 1948. Lia unua eldonita verko estis vojaĝ-rakonto, *Vagado sub palmoj* (1956). Post lia morto aperis en 1963 *Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud*, romano en la formo de aŭtobiografio de azeno. Jean Ribillard fariĝis ano de Budhana Ligo Esperantista kaj redaktis ĝian organon *La Budha lumo* el la pacifika insulo Tahitio, kie li loĝis ĝis sia morto.

DEMANDO 15

(la respondo aperos en nia n-ro de januaro 1978)

La unuaj ekzemploj de originala literaturo en Esperanto estas la verkoj de d-ro L.L. Zamenhof. Kvankam lia prozo ne estas beletro en la strikta senco de la vorto, la multnombraj artikoloj, leteroj kaj paroladoj, kiujn li verkis, montras, kiel li trafe esprimis sin per imitinda stilo. La ĉi-subaj citaĵoj konsistas el la lastaj frazoj de kvin verkoj de Zamenhof. Ĉu vi povas diveni pri kiuj verkoj temas? Kiam Zamenhof verkis ilin kaj por kiu celo?

A. "... Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu depen-



das de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je "flankaj aferoj"; mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon kaj ... mi transiris Rubikonon."

B. "... Ni devas ĉiuj egale labori, ĉiu laŭ siaj fortoj, ĉiu el vi povas nun fari por nia afero tiom same kiom mi, kaj multaj el vi povas fari multe pli ol mi, ĉar mi estas sen kapitaloj, kaj el mia tempo, okupita de laboro por ĉiutaga pano, mi povas oferi al la amata afero nur tre malgrandan parton. Mi faris por la afero ĉion, kion mi povis, kaj se ĉiu efektiva amiko de l'lingvo internacia alportos al ĝi eĉ la centan parton de l'moralaj kaj materialaj oferoj, kiujn mi al ĝi alportis tra dekdu jaroj ĝis hodi-

aŭ, tiam la afero iros bonege kaj venos al la celo post la plej mallonga tempo. Ni laboru kaj esperu!”

C. "... La projekto de la Kongreso estis la lasta provo, kiun ni faris, por unuigi ĉiujn personojn, kiuj nomas sin amikoj de la ideo de lingvo internacia. Ĝi montris al ni ankoraŭ unu (nun jam la lastan) fojon, ke ĉiuj penoj kaj provoj kontentigi niajn kontraŭparolantojn, estas tute vanaj kaj kondukas al nenio. Ni forlasu do por ĉiam ĉiujn provojn de cedado kaj ni iradu de nun trankvile nian vojon, ĉiam rekte antaŭen, memorante, ke la vero estas sur nia flanko kaj ke kiu volas kontentigi ĉiujn, kontentigas neniun.”

Ĉ. "... Ni ne bezonas jam nun atendi kongresojn: la celo estas tute klara kaj ĉiu povas sin tiri al ĝi. Ne bezonante rigardadi, kion diras aŭ faras aliaj, ĉiu povas alporti sian ŝtonon por la kreskanta konstruo. Nenia ŝtono perdiĝos. Nenia laboranto tie ĉi dependas de la alia, ĉiu povas agadi aparte, en sia sfero, laŭ siaj fortoj, kaj ju pli da laborantoj estos, tiom pli rapide estos finita la granda konstruo. Precipe ni turnas nin al diversaj sciencaj societoj kaj kongresoj. Ne rigardante, kion faras aliaj, ne atendente, ke aliaj prenu sur sin la iniciativon, ĉiu societo aŭ kongreso aparte decidu ion tian, kio alproksimigus la grandan komunehoman celon almenaŭ je unu paŝo.”

D. "... Por ni estas gravaj ne iaj bagatelaj eksteraj detalaĵoj de nia lingvo, sed ĝia esenco, ĝia ideo kaj celotial ni antaŭ ĉio devas zorgi pri ĝia seninterrompa vivado, pri ĝia senhalta kreskado. Granda estas la diferenco inter homo-infano kaj homo-viro; granda eble estos la diferenco inter la nuna Esperanto kaj la evoluciinta Esperanto de post multaj jarcentoj; sed dank' al nia diligenta gardado, la lingvo fortike vivos, malgraŭ ĉiuj atencoj, ĝia spirito fortiĝos, ĝia celo estos atingita, kaj niaj nepoj benos nian paciencon.”

Esperanto en radio

Pri aliaj detaloj vidu nian revuon de novembro 1977 (p.198).

SVISA RADIO. De novembro ĝis majo la jenaj ondlongoj estas uzataj: lunde, merkrede kaj vendrede de 18.00 ĝis 18.15 ondoj 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz); marde, ĵaŭde kaj sabate de 21.35 ĝis 21.45 ondoj 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 30.98m (9685 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.32m (11850 kHz). Aŭskultantoj estas petataj skribi al la stacio kaj prezenti siajn kritikojn kaj sugestojn; ankaŭ raportoj pri la kvalito de aŭdebleco. Adreso: Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando; ĉiu korespondanto ricevos la programfolion.

VATIKANA RADIO prezentas ankaŭ dum la noktoj de sabato al dimanĉo de 22.30 ĝis 00.30 per ondoj 196m (1529 kHz) kaj 48.47m (6190 kHz) muzikan programon titolitan "Kun vi en la nokto" kun

parolaj intervaloj en diversaj lingvoj; ĝi enhavas ankaŭ programeron en Esperanto, kiu okazas iam inter 23.15 kaj 23.45. Raportoj pri aŭskultado de tiu programo kaj ankaŭ de la dimanĉa vespera elsendo estas ricevataj ĉe Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio. Korespondantoj ricevos la monatan programkajeron.

ITALIO. En Rimini, ĉe la adriatika marbordo, loka privata stacio estas starigita en franciskana monaĥejo sub la nomo "Esperanto Radio 44-a paralelo". La programoj estas disendataj posttagmeze kaj vespere per ondo 97.50 MHz (mod. frekv.) kaj atingas distancon de 30 kilometroj; ili konsistas el muziko kaj informoj pri lokaj eventoj. Iniciantoj kaj kunlaborantoj estas pastroj Albino Ciccanti kaj Giulio Magnani, s-ro Antonio Gambuti kaj grupo de bonvolaj gejunuloj.

Oficiala Informilo

N-ro 511

SOCIETO ZAMENHOF 1977

NED: 228 L. Adelaar.

SOCIETO ZAMENHOF 1978

FRG: 1 E. Fritsch; 2 M. Gründler; 3 H. Klünder; 4 M. Klünder; 5 W. Klünder.

DONACIOJ 1977 (Gld.) ĝis la 31a de oktobro

ASOCIA KAPITALO: Nederlando: G.B.J.M., Hilversum (por Ĉambro Zamenhof en la CO de UEA) 5000,00. Sumo ĝisnuna: 12181,62.

FINANCA PROGRAMO: Kanado: Ges-roj du Temple 1278,42. Sumo ĝisnuna: 6475,90.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 27,59. Sumo ĝisnuna: 1383,29.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: M. Laade 400,00. Nederlando: R. Moerbeek 50,00. Institucio Hodler 4000,00. Sumo ĝisnuna: 6147,53.

ĜENERALA KASO: Aŭstrio: F. Casar 7,53. Finnlando: Finnlandano 100,00. FR Germanio: M. Laade 450,00. Nederlando: W.B.P. Blomme 20,00. Svislando: A. Maeder 7,61; N. Weiss 7,61. Usono: J.L. Lewine 100,00; M. Starr 244,00. Sumo ĝisnuna: 5595,36.

PROPAGANDA KONTO: Institucio Hodler 4400,00. Sumo ĝisnuna: 4400,00.

UNESKO-KAMPANJO: Francio: F. Lo Jacomo 25,00. Hispanio: R. Molera 4,60. Kanado: Ges-roj du Temple 1000,00. Svislando: J. Vogel 45,68. Sumo ĝisnuna: 5329,66.

*Antaŭdankon
por la frua pago
de via kotizo
por la jaro 1978*

Indekso 77

REVUO ESPERANTO, 70a JARKOLEKTO, N-ROJ 853 – 864

Adcock, C.J. 13
 Administrado 105
 Akademio 37
 Amouroux, J. 188
 Andrianova, N. 172
 Angelova, M. 156, 157
 Argentino 96
 Arieti, C. 137
 Armand, D.L. 38
 Auld, W. 23, 64, 73, 126, 151, 154, 155, 157, 172, 187, 212
 Aŭstralio 16,
 Aŭstrio 16
 Bacelar, A. 36
 Bahorić-Rukavina, C. 120
 Balbin, J. 25, 36, 37, 197
 Balkányi, P. 68
 Belartaj Konkursoj 23, 43, 82, 154, 166, 167, 169-171, 173
 Belgio 17, 49, 77, 96, 118, 176, 196
 Benczik, V. 12, 32, 73, 92, 168
 Berger, J.F. 100
 Bernard, R. 11
 Bernasconi, E. 172
 Bibliografio 13, 33, 43, 54, 74, 93, 133, 174, 193, 213
 Bibliotekoj 97
 Blanke, D. 151, 186, 189
 Bociort, I. 85
 Bödvarsson, Á. 30, 151
 Boia, A. 85
 Boirac, E. 188
 Bolivio 16
 Booth, N. 178
 Bormann, E. 17, 119, 138
 Bormann, W. 163
 Boulton, M. 73, 91, 97, 122, 135, 157
 Brandenburg, G. 34, 95, 159
 Brazilo 16, 75, 77, 118, 138
 Britio 16, 44, 66, 77, 96, 176, 197, 215
 Bulgario 37, 56, 96
 Burns, R. 53, 212
 Cappa, G. 47, 53
 Carlén, E. 151
 Carlevaro, T. 13, 52
 Carter, J. 138, 165
 Cassey, A. 156
 CED 3, 43, 103, 114, 155, 168, 186, 206
 Centra Oficejo de UEA 1, 22, 81
 Chapellier, J. 38

Chicot, E. 161
 Clavel, M. 17
 Conterno, C. 133, 138, 173
 Cool, J.F. 177, 211
 Corsetti, R. 6, 41, 69, 72, 95, 152, 158, 191
 Ĉeĥoslovakio 118
 Ĉinio 17, 27
 Damjanov, V. 77, 156
 Daskalov, E. 178
 Daŝgupto, P. 11, 72, 151, 158, 172, 212
 Delcourt, M. 188
 Delegita reto 16, 97, 105, 190
 Denoël, P. 21, 47, 84
 Diplomatio 144
 Dratwer, I. 191
 Dresen, H. 57, 69
 Duc Goninaz, M. 6
 Edmondson, A. 37
 Egami, F. 77, 150
 Egiptio 16
 Ekspozicioj 36, 97, 138, 176, 196
 Eksteraj rilatoj de UEA 82, 109, 141-144, 148, 161
 Ekvadoro 118
 Ekzameno E 19, 39, 59, 79, 99, 120, 180, 199, 216
 Eldona agado 1, 23, 163

Eldonaĵoj:

Akvariinfanoj, La 32
Babeltöl a Világnyelvig 211
Ĉu vi kuiras ĉine? 32
Doutor Esperanto 12
Dum la noktoj 73
Ekbruligis mi fajron en kor' 172
Esperanto 69, 88, 107
Esperanto-dokumentoj 86
Esperanto et Interlingua 172
Esperanto o Interlingua 33
Esperanto panorama 17
Esperanto programmato 74
Esperanto sem preconceitos 12
Eŭropa dokumentaro 61
Filigranoj el lumo 72
Forkaptita 173
Fundamentoj de psikologio 13
Hebreo el la geto 91
Homa animo 72
Honore al ili 53
Ĥimeroj, La 132
Internacia jura revuo 17

Internacia kanzonaro 132
Internacia lingvo en eklezio kaj mondo 92
Internacia pedagogia revuo 9
Jen nia mondo 192
Kantoj kaj poemoj de Robert Burns 53
Kantoj, poemoj kaj satiroj 212
Karuselo 92
Kvindek argentiaj kanzonoj 132
Kvindek argentiaj tangoj 132
Lingua e politica 72
Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado 3, 155, 206
Lingvistikaj aspektoj de Esperanto 156
Malnovaj rakontoj en Takatuki 192
Mastro de Kôrboja 133
Monda karuselo 37
Mozaiko Tokio 12
Naskitaj sur ruino 92
Neologisme 52
Perdita vizaĝo, La 91
Pri internacia lingvo dum jarcentoj 191
Primico 172
Proverbaro 52
Rekomendo pri eduko... 201
Renesanca periodo, La 211
Rimletoj 73
Scienca mondo 5, 61
Sennacieca revuo 177
Sufoko 95
Transe 52
Vastaj horizontoj 210
Vojo, La (kaseto) 173

Eldonejoj 2, 163
 Elekto de komitatanoj B 38, 98, 135
 Enciklopedio de Esperanto 168
 Enketoj 37, 88, 196
 Epstein, F. 177
 Ereno, P. 12
 Ergoto de Bonaero (pseŭd.) 92
 Eroŝenko, V. 172
 Esperantologio 85, 123, 125, 127, 186
 Esplorado kaj planado 22, 81
 Estrara Raporto 1976-77 105-117, 152
 Eŭropa Komunumaro 17, 26, 47, 103
 Faka agado 9, 87, 113, 134, 138, 139, 210
 Fantom, I. 44
 Ferez, H. 200
 Filatelo 77, 215
 Filmo 48, 55
 Financa Programo 106
 Financo 22, 106, 115-117, 149
 Finnlando 2
 Forster, P.G. 123
 Foto-servo pri Zamenhof 209
 Francini, W. 12, 74
 Francio 16, 36, 96, 138, 215
 Franco, D.P. 72

- Frank, H. 8, 37, 104, 151
Germanio, DR 21, 57, 189
Germanio, FR 8, 17, 34, 36, 37, 95, 96, 97, 138, 196
Gitzinger, A. 18
Golden, B. 19, 39, 59, 79, 99, 120, 154, 169, 180, 199, 211, 216
Goodheir, A. 138, 173
Graetz, R. 200
Grattapaglia, U. 138, 158
Gregory, E. 37
Greklando 118
Gropuzzo, A. 100
Grum, J. 36
Ĝivoje, M. 43, 97
Halager, G. 138
Harry, R. 25, 36, 85, 143, 158
Haudebine, M. 36, 154
Haupenthal, R. 168
Hill, D. 73, 156, 157
Hill, M. 73
Hinda Unio 41, 137
Hispanio 14, 118
Historio 57, 127, 130, 188
Hoekstra-Sieders, J.H. 29
Holmes, H. 177
Homaj rajtoj 96, 201
Honkongo 27
Honoraj membroj 150
Honora Patrona Komitato 150
Hoŝi, M. 28
Houghton, C.M. 11
Hungario 17, 97, 176
ILEI 9, 36, 84, 119, 135, 177
Informado 16, 17, 24, 28, 36, 37, 56, 57, 69, 76, 77, 96, 97, 108, 118, 119, 138, 158, 161, 176, 181, 197, 202, 215
Instituto Hodler '68 23, 102, 107
Instruado 8, 17, 84, 95, 119, 135
Instruistoj 37, 77, 118, 119, 154, 196
Interlingvistiko 8, 16, 37, 56, 85, 96, 177, 187, 189, 197
Internacia Somera Universitato 82, 151, 195, 197
Ionescu, E. 120
Irano 41, 109, 197, 202-208
Isaev, M.I. 24
Islando 30, 70, 141, 157
Israelo 75, 194, 199
Italio 57, 76, 95, 137
Jansen, W. 72
Japanio 28, 76, 176, 189
Jazdani, A. 200
Jong-Beukers, R. De 154
Jordan, D.K. 85
Jordanio 28
Jugoslavio 14, 119, 181
Jung, T. 215
Kalendaro de eventoj 50, 136, 214
Kantonen, L. 154
Kärt, B. 133
Kautsky, K. 127
Kawamura, S. 151
Kawasaki, N. 191
Kehlet, E. 92
Kehlet, T. 2, 138
Kindler, H. 104
Kirtz, G. 69
Kohen-Cedek, J. 138
Kolker, B. 172
Kolombio 29
Komerco 36
Komunikado 101, 144-147, 151, 152, 158
Konferencoj 56, 96, 177
Kongresoj:
UK 61a, Ateno 82, 107, 116
UK 62a, Rejkjaviko 15, 35, 93, 141-160, 162
UK 63a, Varno 108, 195
UK 64a, Lucerno 108
IJK 33a, Poitiers 14, 55, 75, 159, 175
IJK 34a, Veliko Tarnovo 194
Kongresoj aliaj:
Blindula 97
Eŭropa 119
Fervojista 76, 134
Japana 176
Kolombia 29
Nov-Zelanda 196
SAT-kongreso 165
Slovaka 118
Usona 56, 165
Koós, A. 17
Koreo 176, 196, 197
Kořinek, J. 154, 170
Korytkowski, J. 92
Kostariko 36, 49
Kotizoj 42, 179
Kovač, K. 137
Krajnov, S.N. 37
Kühlmann, G. 135
Kurusu, K. 49
Kuroda, M. 154, 173
Kursoj 56, 76, 85, 95, 118, 137, 154, 176, 177, 196, 197, 202
Kuvajto 97
Kuzume, S. 28
Labortendaroj 14, 119
Lacalendola, A. 137
Landa agado 41, 113
Lapenna, E. 11
Lapenna, I. 8, 17, 96, 161
Leivo-Larsson, T. 200
Lerneja bulteno 9
Lernejoj 84, 135
Lernolibroj 41, 44, 137
Lesznai, L. 73, 132
Leteroj de legantoj 11, 69, 190
Libroj 11, 46, 77
Lieberman, E.J. 151
Lingva diskriminacio 6, 103, 164
Lingva servo 4
Lingvo 24, 64, 69, 125, 187, 190
Lingvo-politiko 37, 104
Lingvo-problemo 6, 17, 24, 26, 68, 85, 95, 103, 138, 164, 177
Lins, U. 53, 103, 127, 168
Lippe, E. 138
Literaturo 25, 30, 122, 126, 138, 154, 157, 166, 169-173
Llech-Walter, R. 96, 215
Logvin, A. 138
Lo Jacomo, F. 87
Long, K. 138, 177
Lorjak (pseŭdonimo) 52
Luksemburgo 103
Lundin H. 178
MacGill, S. 55, 81, 135, 154, 175
Madagaskaro 196
Maertens, G. 177
Maimon, N.Z. 130
Majchert, W. 190
Malto 76, 119
Martin, H. 177
Maul, S. 92
Mautner, I. 120
M'Bow, A-M. 96, 141-147, 154, 161
Medicinistoj 56, 154
Membro-statistiko 58, 105
Milojević, S. 41, 49, 81
Minoritatoj 14
Miyamoto, M. 92
Molle, G. 173
Mondcivitanoj 102, 166
Mongolio 137
Morariu, E. 37
Movado, 1, 21, 41, 49, 84, 101, 121, 148-150, 202
Muziko 77, 156, 157, 197
Nederlando 2, 17, 36, 55, 176, 196, 215
Nerval, G. de 132
Nervi, M. 138
Nesvadba, J. 91
Neŭtraleco 21, 89
Nevan, M. 22, 81
Nezvál, F. 97
Norvegio 56, 181
Novljan, F. 120
Nursall, H. 120
Oficiala informilo 18, 38, 57, 79, 98, 139, 178, 199, 217
Oyarzabal, J. de 137
Parlamenta agado 111
Paruzel, H.H. 100
Patrinu, D. 72
Peeraerts, P. 173
Peevski, V. 5, 151, 195
Periodaĵoj v. Eldonaĵoj
Pič, K. 69
Pilger, W.F. 32
Piron, C. 17, 32, 125, 159
Pollando 96, 196, 215
Pool, J. 3, 85, 151, 206
Popović, B. 5
Portugalia 36
Pot, C. 120
Power, C.R.L. 85, 91, 97, 192
Prelegvojaĝoj 28, 36, 37, 77, 96
Premioj 57, 76, 138, 154, 177
Pupteatro 11, 181, 182

Radio 40, 44, 78, 90, 98, 140, 198, 217
 Ragnarsson, B. 143, 153, 157, 158, 162, 166
 Ragoncza, S. 200
 Ré, H. 132
 Recenzoj: v. Eldonaĵoj
 Regiona agado 41, 48, 67
 Régulo Pérez, J. 2, 163, 185
 Riis, A. 137
 Rinĉen, Y. 137
 Ritterspach, G. 134
 Roberts, C.W. 18
 Rossetti, R. 37, 212
 Rumanio 38, 76, 85, 176
 Sadler, V. 23, 36, 83, 85, 197, 202
 Saheb-Zamani, M.H. 41, 202
 Salvadoro 215
 SAT 165
 Schmuckher, A.F. 100
 Sekelj, T. 177
 Semajno de Internacia Amikeco 5
 Seminarioj 6, 34, 77
 Senkoloniigo 10
 Setälä, V. 77
 Sigurdsson, Ó.J. 157
 Simeonov, S. 138
 Simonnet, F. 135
 Sindikatoj 177
 Sinha, L. 137
 Skaljer-Race, V. 154
 Skoltoj 9, 210
 Sloušĉ, N. 130
 Solzbacher, W. 25, 191
 Someraj Univ. Kursoj 177, 197
 Sona gazeto 86
 Sonnabend, H. 8, 136
 Soveta Unio 16, 24, 56, 137, 196

Sporto 62
 Statuto 81, 105
 Stefanović, P. 132
 Stevenson, R.L. 173
 Støp-Bowitz, C. 57, 135, 151
 Sud-Afriko 56, 96
 Sud-Ameriko 41
 Sullivan, J.H. 210
 Sussman, L. 152
 Svedio 14, 76, 97, 197
 Svislando 16, 36, 48, 76
 Swarsensky, B. 200
 Szczurek, K. 154, 167
 Szerdahelyi, I. 6, 8, 211
 Šturová-Seppová, M. 8
 Štimec, S. 56, 95, 182
 Tagor, R. 172
 Tajlando 27
 Takeda, R. 49
 Tammsaare, A.H. 133
 Teatro 55, 76, 153, 157, 159, 185
 TEJO 14, 34, 55, 75, 95, 112, 159, 175, 194
 Televido 57, 119, 137, 138, 158, 176, 182, 215
 Terminaroj 62
 Thaillet, B. 191
 Thien, H. 209
 Tito, J.B. 119
 Tonkin, H. 1, 36, 85, 135, 142, 148-150, 152, 158
 Tonkin, J. 70
 Transporto 138
 Tuinder, J.A. 190
 Turismo 138
 Tyynelä, T. 135, 190
 Tzaut, O. 156

UEA:
 Estraro 22, 81, 105, 155
 Komitato 41, 105, 155
 Ujlaky-Nagy, T. 11, 63, 178
 Ullman, P. 25, 37
 UN 10, 85, 109, 183
 Unesko 11, 17, 34, 101, 109, 141-148, 152, 154, 161, 197, 201
 Universitatoj 17, 44, 56, 85, 118, 137, 176, 183, 189, 196, 197, 202
 Usono 25, 36, 56, 85, 118, 199
 Varbado 2, 175, 178
 Venezuelo 137, 138, 176
 Venture, A. 72, 192
 Verloren v. Themaat, W.A. 32, 33, 90, 172, 187
 Viladoms Valls, J. 18
 Vjetnamio 56, 90
 Volontula servo 1, 47, 105
 Volpelière, R. 102
 Vortaroj 41, 43
 Wandel, A. 75, 194
 Waringhien, G. 52, 121, 132, 138, 211
 Wehrheim, H. 178
 Weide A. 197
 Wells, J.C. 23, 156, 192
 Widén, J. 120
 Williams, N. 197
 Włodarczyk, W. 8, 200
 Woessink, E.J. 27, 48, 166, 184
 Woessink-Nagata, A. 27, 119, 166
 Wohlberg, J. 200
 Wood, R.E. 3, 25, 37, 85
 Wüster, E. 83, 103
 Yagi-Nihei 12
 Zacho, P. 32
 Zamenhof, L.L. 91, 123, 134, 209

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

MONDCIVITANOJ adoptis Esperanton en sia kongreso (1977). Por plenumigi tiun decidon la minoritato de esperantistoj inter la Moncivitanoj ege kresku – Volpelière, 8, rue Rouget de Lisle, F-30000 Nîmes, Francio.

Trezorinsulo de R.L. Stevenson, senmorta rakonto por junuloj ĉiuagaj, trad. Grace Kirkwood, il. Ruth Goodheir. KARDO, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE Skotlando. Prezo £2.80 (7 ekz. £2.10).

Kun samaĝuloj volas korespondi s-ro Acbar Sedagat (24-jara), Customs Police, Bandar-e Pahlavi, Irano.

La Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklatur, Hertendreef 12, B-2180 Kalmthout, Belgio, propagandas inter sciencistoj la uzon de Esperanto-terminaj sciencaj nomoj de bestoj kaj plantoj. Membroj en pli ol 30 landoj.

Bonŝanculo gajnos bonŝancaĵon. Klarigu superstiĉojn pri ŝanco, bonŝancaĵoj vialandaj. Harler, 47 Hardy Road, Levittown, PA 19056, Usono.


"Bhagavad-gîtâ – Mendu kontraŭ 4 rpk. ĉe Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, Caixa Postal 3133, Rio de Janeiro, Brazilo.

39-jara teknikisto, edziĝinta, kun 2 infanoj, deziras korespondi kun la tuta mondo: Helmut Strübig, Waldstr. 11, D-3070 Nienburg, Germ.

Sperta esperantisto serĉata por kunverkado de libro pri la nordhinda klasika muziko. Hinda duonkomen-canto Esperanta verkis 200-paĝan manuskripton, kiu bezonas lingvan reviziadon (oni devas retajpi grandan parton de ĝi) kaj ankaŭ solvodon de kelkaj problemoj kiel esperantigo de hindaj muzikaj terminoj, studado de pli racia prezentplano por temo tute nova por la legantoj. Interesiĝantoj bonvolu anonci sin ĉe: Renato Corsetti, Via Strabone, 1, I-00176 Roma, Italujo.

Ni urĝe bezonas ge-korespondantojn en Eŭropo por infanoj 13–16-jaraj. Skribu al: S-ro A. Nutton, South Craven School, Cross Hills, Keighley, Anglujo.

Ni aĉetas malnovajn E-librojn por kompletigi nian jam milvoluman kluban bibliotekon, bv. sendi vian ofertoliston al Lingvoponto, PL 119, SF-70101 Kuopio 10, Finnlando.



LASTATEMPE ELDONITA DISKO (aŭ kaseto):

TRA L' MONDO

de Olivier Tzaut, Svislando

Kristnasko proksimiĝas, kaj kun ĝi la tempo de la donacoj, kiujn ni ne-eviteble devos fari! Nu, vi povas **samtempe** kaŭzi grandan ĝojon al konato kaj amigi al li la lingvon kies disvastigon vi fervore deziras. Neeble? Jes ja! Por tio, faru kiel tiu pariza samideano, kiu aĉetis 10 diskojn "TRA L'MONDO", unu por si, kaj naŭ por la amikoj kaj parencoj!...

Estas la unua disko de popolkantoj (meksikaj, ciganaj, usonaj, rusaj...), kiu aperis en Esperanto ĉe vere profesia nivelo. Viaj amikoj kaj parencoj mire konstatos, ke Esperanto estas tre belsona, kaj ili komprenos la signifon de la vortoj. Ja, tiu granda 33-turniĝa disko (aŭ la kaseto) enhavas la presitan tekston de la kantoj en Esperanto, plus folion en nacia lingvo titolitan "Mallongaj lingvaj indikoj", kiu rolos kiel unua Esperanto-leciono. La vortoj kaj la lingvaj indikoj estas disponeblaj en la jenaj lingvoj: franca, angla, germana, itala, nederlanda, dana, japana. Aliaj tradukoj sekvas baldaŭ.

Ĉu ne bona ideo? Ek! Vi tuj mendu la diskon, kaj vi tiel "trafos du celojn per unu ŝtono," kiel diris Zamenhof!

PS 1: La aranĝisto kaj la muzikistoj estas profesiuloj. Tradukinto: Claude Piron.

PS 2: Vi fakte trafos per unu mendo tri celojn, ĉar la mona profito (ne estas komerca profito) estas ekskluzive dediĉata al poresperanta agado (Olivier Tzaut laboras duontempe nesalajrite kiel sekretario de Kampanjo "Esperanto en la lernejojn", en Svislando).

Kion ili pensas pri la disko:

Raymond Colbert, ĵurnalisto, ĉe la romandia radio, la 31an de aŭgusto: "Substrekinda estas la nomo de tiu mirinda kantisto, kiu elektis kanti en Esperanto".

"L'Impartial", svisa gazeto, la 14an de oktobro: "Li havas mirigajn kvalitojn, tiu kantisto, kiu ĵus registris sian unuan diskon! Kaj unue rimarkindan voĉon, el tiuj, maloftaj, kiuj ne bezonas elektronajn artifikojn!"

Marjorie Boulton (en letero al O. Tzaut): "Mi vere esperas, ke viaj sukcesoj kiel artisto ebligas al vi forlasi la instruadon kaj labori por muziko kaj Esperanto."

"Pilo-Press", 1977.09.22: "Tiu disko estas vere agrabla surprizo. Ja, oni povas diri, ke ĝi estas unu el la plej bonaj Esperanto-diskoj. La kantado de Olivier Tzaut, lia agrabla voĉo kaj senriproĉa klara prononcado estas arta ĝuo."

Albert Lienhardt: "Mi nur povas laŭdi la rezulton de via iniciato; ĝi estas ĉiu-rilate modela kaj alte superas ĉion, kion mi povis aŭdi ĝis nun en tiu ĝenro. Tre sincerajn gratulojn!"

Grete Breunlich, viena Esperanto-radio: "Laŭ nia juĝo la disko estas eksterordinare bona!"

La disko (aŭ la kaseto) estas havebla ĉe UEA, ĉe kelkaj landaj libroservoj kaj rekte ĉe Olivier Tzaut kontraŭ **antaŭpago** de 26 svisaj frankoj al jena ĝirkonto: O. Tzaut, Bellevue 20, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, pĉk. 23-3656, Svislando. Prezo ĉe la Libro servo de UEA: 28,80 (por Nederl. 33,98) gld., plus 10% sendokostoj.

Propaganda poŝtstampo

De la 15a de decembro 1977 ĝis la 15a de januaro 1978, en la poŝtoŭicejo de la urbo Verviers, la poŝtmarkoj estos denove stampataj per franc-lingva reklamo pri Esperanto.

Sendu koverton kun 3 aŭ 4 surgluitaj poŝtmarkoj de via lando kaj unu internacia respondkupono. Vi ricevos bildkarton de nia urbo kaj la specialan poŝt-stampan reklamon. Skribu al ni multnombro. Nia adreso: Verviersa Esperanto-Grupo, Rue Donkier 22, B-4800 Verviers, Belgio.

fariĝu domposedanto

Per aĉeto de akcioj vi realigas novan internacian kulturdomon. — "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof". Informojn petu ĉe: s-ro **Sudec**, Wandsbeker Chaussee 155, D-2000 Hamburg 76.

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la Koresponda Servo Mondskala de UEA. Adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.

ABONU AŬ REABONU LA ĈINAN MONATAN GAZETON EN ESPERANTO

EL POPOLA ĈINIO

EL POPOLA ĈINIO

11
1977

中國新聞



1. Periodo de la abonvarba kampanjo 1978:
de la 1-a de nov. 1977 ĝis la 28a de feb. 1978

Novaj aŭ renovigaj abonantoj, kiuj faras siajn abonojn en la periodo, povos senpage ricevi ekzempleron de grandformata kalendaro de 1978 kun koloraj ĉinstilaj pentraĵoj.

2. Abonprezoj:

1 jaro	£0.90	US\$ 2.20	Gld. 6.00*	FF 10.00
2 jaroj	£1.35	US\$ 3.30	Gld. 9.00*	FF 15.00
3 jaroj	£1.80	US\$ 4.40	Gld. 12.00*	FF 20.00

3. Estu abon-varbantoj de EPCĉ, sekve vi ricevos ĉinstilajn memoraĵojn.


4. Peranto: Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio
SPECIMENO KAJ ABONVARBILO SENPAGE AKIREBLAJ LAŬPETE

* Nederlandanoj pagas la enlandan imposton de 4% kaj la prezoj por ili sekve estas 6,24, 9,36 aŭ 12,48 gld.

Librotenisto

La Centra Oficejo de UEA en Rotterdam serĉas libroteniston aŭ librotenan helpanton por baldaŭa enoficiĝo. Salajro dependos de sperto kaj kvalifikaĵoj. Dezirataj (laŭ ordo de graveco): adekvata scio de Esperanto, kompreno de la klasika sistemo de librotenado, sperto kun libroten-kaj kalkul-maŝinoj, kapablo memstare kompili bilancon. Petu detalan respondilon ĉe la direktoro de la C.O., Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel. (010) 36 15 39



Librotena maŝino en la Centra Oficejo

AL
VI
DE
MI



ALBERTA CASEY, el La Jolla, Kalifornio, ĵus produktis sian unuan gramofondiskon kun dek sep Esperantaj kantoj. Kvankam temas pri bone konataj, popularaj melodioj de diversnaciaj komponistoj kaj teksto-tradukintoj, la disko estas pli ol kutime rezulto de unuopa sindediĉo, ĉar: Alberta ne nur kantas, sed ŝi ankaŭ desegnis la kovrilon, ornamis ĝin per fotografajo de la busto de d-ro Zamenhof, kiun ŝi mem skulptis, kaj — fine — la disko aperas kiel propra eldonaĵo de la artistino. La disko estas grandformata, stereofona. Pian-akompano de Edith Gordon. Prezo: Us. dol. 7,00 (18,00 gld.). Mendu ĉe ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono, aŭ ĉe la Libroservo de UEA.